kaj la montoj, kaj ĉiu venteto venas malvarmigita de la unu aŭ la alia. Oni skribis al la Komitato ke li sciiĝas ke neniu loĝas en Washington dum la somero!!!! La vero pri ĝi estas ke Washington estas samila al ĉiu alia urbo en Usono, norda, meza, aŭ suda. Multaj personoj havas dusemajnan libertempon dum la monatoj julio aŭ aŭgusto. Dum tiu ĉi liber-tempo estas la modo iri al la marbordaj plezurejoj aŭ al la montoj. Plie la Usona Kongreso ordinare česigas siajn kunsidojn, kaj la kongresanoj, iliaj sekretarioj, k. t. p., venas al siaj hejmstatoj. Sed la pasintan jaron la Kongreso, kiu havas plenan povon iam ĉesigi siajn kunsidojn, daŭris ĝis Aŭgusto. Tial ne timu ke Washington estas tro varma. kaŭ ĉiu ano de la Organiza Komitato loĝadis dum kelkaj tutaj someroj en Washington, kaj ne suferis pro la varmeco, kaj kelkaj el ili venis antaŭe de nordaj statoj. Jen la raporto de la Usona Oficejo pri Vetero:

Jaro		Fahr.	Centigrado
1899	Aŭgusto 15-21	73	23
1900	14-20	81	27
1901	13-19	77	25
1902	12-18	68	20
1903	11-17	70	21
1904	16-22	73	23
1905	15-21	70	21
1906	14-20	76	24
1907	13-19	73	23
1908	11-17	79	26
1909	17-23	71	22

La "normala temperaturo" kalkulita de la meza temperaturo de ĉi tiu semajno dum 33 jaroj estas por la semajno aŭgusto 14-20, Fahr. 75, Centigrado 24. Car ĉiam estas refresigaj ventetoj la vetero eĉ sajnas pli malvarma ol supre donita.

LOGADO KAJ MANGADO.

La Organiza Komitato volonte faros aranĝojn por la kongresanoj pri loĝado, k. t. p. La hotelo "Arlington," kiu estas rekte trans la parko Lafayette kaj tre proksima de la "Blanka Domo," estos la konstruaĵo en kiu troviĝos la akceptejo, k. t. p., kaj en kies grandaj haloj okazos kelkaj el la kunsidoj de la Sesa. En ĉi tiu hotelo la specialaj prezoj al kongresanoj estos la jenaj:

Logado sen mangado (nomita "European Plan"):—Unu gis du dolaroj (du gis kvar spesmiloj) por unu tago por unupersona ĉambro; sama ĉambro kune kun banoĉambro, du ĝis tri dolaroj (kvar ĝis ses spesmiloj) por unu tago.

Loĝado kun manĝado (nomita "American Plan"):-Tri dolaroj (ses spesmiloj) por unu persono en unu ĉambro; kvin dolaroj (dek spesmiloj) por du personoj en unu ĉambro. Banoĉambro kostas unu dolaron (du spesmilojn) plu.

Kelkaj aliaj hoteloj donos pli malkaran prezon, sed ili ne estas tiel proksimaj de la kongresaj sidejoj. Sed la komitato povas aranĝi por loĝado kaj manĝado en bona hotelo po du dolaroj (kvar spesmiloj) por unutaga

loĝado kaj manĝado.

Aldone, la komitato ankaŭ aranĝas por logado kaj mangado en logejoj, pensioj, k. t. p. La komitato havos multajn ĉambrojn, bonajn kaj purajn, en sufice bonaj lokoj, po tri ĝis kvar dolaroj (ses ĝis ok spesmiloj) por unu semajno, kaj ankaŭ unu aŭ kelkajn manĝejojn kie oni ricevos bonajn manĝojn po kvin dolaroj semajne. Kompreneble oni povas loĝi ĉe la "Arlington," aŭ alia hotelo, kaj manĝi aliloke.

Skribu al la komitato se vi volas antaŭaranĝojn pri loĝado, kaj skribu klare kaj plene kion vi volas. La komitato penos plenumi viajn volojn. Adresu la Sekretarion, S-ro Edwin C. Reed, Chamber of Commerce, Washington, D. C., Usono.

KARTOJ, POSTKARTOJ, KONGRES-MARKOJ.

La kongreskartoj, kiuj enlasos la posedanton en ĉiun oficialan kunsidon kaj feston de la SESA, estas nun aĉetablaj de la Sekretario. La prezo de ĉi tiuj kartoj estas kvin dolaroj (dek spesmiloj), el kiu la duono (kvin spesmiloj) estos redonita al ĉiu, kiu venos el alia kontinento ol Norda Ameriko. Loĝantoj en Norda Ameriko, kiuj aĉetas kongreskartojn antaŭ la unua de junio, povas ricevi la kartojn por kvar dolaroj.

La belaj kongresmarkoj estas nun aĉeteblaj po dudek kvin cendoj (duono da spesmilo) por cent markoj afrankite. La aro de dek kvin postkartoj, kun Washington'aj vidindaĵoj kaj Esperante presitaj, kostas dudek kvin

cendojn (duonon da spesmilo). La kongreskartoj 1 kaj 2 estas jam senditaj al Dro. Zamenhof kaj Srino. Zamenhof.

La unua Eŭropano jam aĉetinta sian kongreskarton estas Sro. Paul Linarés, en Kordovo, Hispanujo.

ESTU REPREZENTATA!

Por plene montri la utilecon de Esperanto je la Internaciaj Kongresanoj estas necese ke kiel eble plej multe diversaj nacioj kaj lokoj estu reprezentataj. Ni devas montri ke kon-gresanoj el ĉiuj partoj de la mondo povas facile interparoli kaj interkompreniĝi per sole la Internacia Lingvo.

Je la Sesa Kongreso estos ankoraŭ pli necese ke Esperantistoj ĉeestu el kiel eble plej multe diversaj nacioj de Eŭropo, Azio kaj Suda Ameriko, ankaŭ el Kanado, Meksiko, kaj ĉiu stato en Usono. Tio estas superege dezirinda je la Usona Kongreso, ĉar, kvankam oni diversloke en Usono uzas ĉiun eŭropan lingvan krom la angla, oni kutime faras ĉion kaj veturas ĉien en nia vasta lando, uzante nur la angla lingvo. Tial la Usona publiko ne tiel profunde sentis la bezonon por internacia komunikilo kaj ĝis nun ne devis akcepti Esperanton tiel ĝenerale kiel ĝi estas jam akceptita en multlingvaj regionoj.

Tial ni petas la Esperantistojn en ĉiu lando,

regiono kaj urbo de la mondo, ke ili estu reprezentataj de almenaŭ unu kongresano ĉe la venonta Kongreso. Ni proponas ke ĉiu Esperantisto, kiu ne povas mem ĉeesti la Kongreson, donu iomete da monhelpo al iu elektita Esperantisto en sia urbo aŭ regiono, kiu havos la libertempon por veni, kaj kiu volonte venos por reprezenti siajn najbarojn ĉe la Kongreso, dononte al ili formalan raporto poste, se nur ili ĉiuj iom helpos lin pri la elspezoj de la vojaĝo kaj de la loĝado en la Kongresurbo.

Tuj grupigu vin, kaj elektu iun, kiu estos via reprezentanto, kaj kies elspezojn vi prenos almenaŭ parte sur vin. Memoru ke la Sesa Kongreso okazos en iu el la ĉefurboj de la mondo, antaŭ la okuloj de la registaro de Usono kaj de la ambasadoroj de la aliaj nacioj de la mondo. Se ni faras bonan impreson sur ĉi tiun registaron kaj la ambasadoroj, tio multege helpos al la Esperantista Afero. Se la Usona Registaro vidos klare ke Esperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo venos por montri tian taŭgecon al Usono, tiam ni povos multe pli facile konvinki la Usonan Registaron ke ĝi akceptu kaj oficiale aprobu la Internacian Lingvon, kaj ke ĝi komencu mem uzi Esperanton, kiel oficiala internacia komunikilo. Estas grava devo de ĉiu Esperantisto en la mondo helpi en ĉi tio. Ĉu vi ne tuj komencos?

PROGRAMO DE LA KONGRESO.

Provizora programo por la Kongreso estos baldaŭ eldonata. Inter aliaj interesaj aferoj

troviĝos la jenaj:

Solena Malfermo de la Kongreso, de Sro. Fred. Pujula y Valles, prezidinto de la Kvina Kongreso, kiu transdonos la prezidantecon al la prezidonto de la Sesa Kongreso. Tuj poste okazos la saluta parolado de Doktoro Zamenhof, kaj la salutoj al la Kongresanoj de registaraj delegitoj kaj naciaj delegitoj.

En la daŭro de la semajno okazos la ĉiutagaj ĝeneralaj kunsidoj, kunsidoj de la Scienca Asocio, la U. E. A., la Lingva Komitato, kaj diversaj fakaj kunsidoj (de juristoj, kuracistoj, teosofoj, apotekistoj, vegetarianoj, publikoficistoj, fervojistoj, k. t. p.). Disdonado de premioj al la gajnjintoj en la Literatura Konkurso. League baseball game, internacia balo.

k. t. p.

Ankaŭ okazos unu propaganda kunveno, al

kiu la generala publiko estos invitata.

Inter la amuzaĵoj provizataj estos neformala akceptado, koncerto de la Washington'a Kolegio de Muziko, vesperprogramo de muziko, k. t. p., de Esperantistaj amatoroj kaj profesiistoj.

Vizitoj estos aranĝataj al la Kongresbiblioteko, la "Blanka Domo," nacia Kapitolo, Trezorejo, ŝtata, Milita kaj Marmilita Konstruaĵoj, Muzeo, Smithsonian's Instituto, Gravur-kaj Preskonstruaĵo, Agrikultura Departemento, Poŝtoficejo, Monumento, Fiŝkomisio, k. t. p. Oni ankaŭ faros mallongajn ekskursojn, ne nur en la turistaj aŭtomobiloj tra la urbo, mem, sed ankaŭ per boatoj, tramvojoj, k. t. p. at Mount Vernon, Kaskadoj de la Potomako, Chesapeake Beach, Marshall Hall (en lunluma riverekskurso), Arlington Nacia Tombejo, Rock Creek parko, Zoologia parko, k. t. p.

Post-Kongresaj Ekskursoj estos priskribataj

en sekvonta anonco pri la Kongreso.

KONDICOJ DE LA LITERATURA KONKURSO.

1. Ciu verko devas esti originala. Nenia traduko estos akceptita.

2. Neniu manuskripto estos akceptita por

pli ol unu konkurso.

3. Neniu manuskripto estos akceptita se ĝi jam estas plene aŭ parte publikigita antaŭ la

disdonado de la premioj.

4. Se laŭ la opinio de la juĝantaro neniu sufiĉe bona manuskripto estas ricevata por iu konkurso, la juĝantaro havas la rajton malakcepti ĉiun manuskripton kaj ne doni la premion. Ili redonos tiun premion al la donacinto.

5. Ĉiu premiita verko apartenos al la donacinto de la premio, dum unu jaro post la Sesa Kongreso, se la donacinto ne alie anoncas. Se la donacinto ne ĝin publikigis antaŭ la fino de tiu jaro, la verko tiam apartenas al la aŭtoro, kaj ne plu al la donacinto.

6. Post la Konkurso, la nepremiitaj manuskriptoj estos resendataj al tiuj aŭtoroj kiuj antaŭ la l'a de Oktobro, 1910, sendos la necesan

monon por pagi la poston.

7. La verkoj devas esti skribitaj sur unu flanko de la papero. Manuskriptoj skribmaŝine skribitaj ricevos la plej zorgan konsideradon. La juĝantaro rajtos tute ignori nelegeblajn manuskriptojn.

8. Sur ĉiu manuskripto devas esti skribita, krom la titolo, nur iu elektita pseŭdonimo de la aŭtoro. Fermita koverto, en kiun la aŭtoro metos sian nomon kaj plenan adreson, kaj sur kiu estas skribita nur la titolo de la verko kaj la pseŭdonimo de la aŭtoro, devos akompani ĉiun manuskripton. Oni povas laŭvole meti la resendpagon en tiun koverton.

9. Ĉiu manuskripto devos esti ricevita de la Konkursa Komitato ĉe la Ĉambro de Komerco. Washington, D. C., antaŭ la 15a de julio, 1910. La sola escepto estas, ke manuskriptojn juĝotajn de "specialaj" juĝantoj (anstataŭ de la Kongresa juĝantaro oni devos sendi rekte al tiuj juĝantoj. Sed la koverto enhavanta la nomon kaj adreson devas esti samtempe sen-

dataj al la Komitato en Washington.

10. La juĝado estos farata de la Kongresa Juĝantaro, kaj ankaŭ de "specialaj" juĝantoj. La Kongresa Juĝantaro konsistos el Esperantistoj zorge elektitaj de la Organiza Komitato, laŭ la propono de la Konkursa Komitato, "Specialaj" juĝantoj estos tiuj Esperantistoj kiujn eble la donacintoj de premioj por verkoj pli—malpli teĥnikaj petos doni sian servon. Donacintoj kiuj volas tiajn juĝantojn devos antaŭe obteni la konsento de la dezirataj juĝantoj, kaj anonci tion al la Konkursa Komitato, samtempe kun la temo kaj premio proponitaj. Se la temo kaj premio estas akcep-

titaj de la Komitato, la speciala juĝanto aŭ specialaj juĝantoj estos akceptitaj, kaj ties decido estos plene aprobata de la Komitato. La specialaj juĝantoj sendos al la Komitato en Washington ĉiun ricevitan manuskripton, kune

kun la anonco pri sia decido.

11. La Konkursa Komitato donos la manuskriptojn al la Kongresa Juĝantaro, por juĝado, tiam kolektos ilin kaj faros liston de la decidoj, kune kun la decidoj de "specialaj" juĝantoj, kaj fine malfermos la kovertojn kiuj enhavas la nomojn kaj adresojn de la aŭtoroj, por fari ĉiun aranĝon pri la anoncado kaj la festo por la disdonado de premioj.

Neniu juĝanto partoprenos en Konkurso por kiu li mem estos unu el la juĝantaro.

Temoj kaj Premioj.

La jenaj temoj kaj premioj estas jam anoncitaj:

Prozaĵo (1,000-2,000 vortoj).—Universala Frateco.-Medalo.

Poezio (20-50 linioj).--Universala Frateco.--Medalo.

Prozaĵo (Rakonto de 2,500-3,000 vortoj.— Medalo.

Prozaĵo (Rakonto de 2,500-3,000 vortoj) verkita de junulo aŭ junulino inter la aĝoj de 15-20 jaroj.—Medalo.

La Simileco inter Zamenhof kaj Lincoln.-La Verkoj de Zamenhof, lukse binditaj.

La Utileco de Esperanto por Blinduloj.— "Braille" libroj. (Speciala Juganto, Prof. Curt, 33 Rue Lacepede, Paris.)

Novaj Temoj kaj Premioj.

Traktato pri la Biblio.--Proponata de Ulysses G. B. Pierce, Kapelano de la Usona Senato. —Libro de Sintezaj Lekcioj el la Biblio, aran-ĝita de la Kapelano mem, kun antaŭparolo de Edward E. Hale, fama antaŭa Senatkapelano. En la libron estos metita aŭtografletero de Dro. Edward E .Hale.

La Útileco de Esperanto en Komerco.-Proponata de la Washington'a Cambro de Komerco.—Arta Objekto je la valoro de dudek

spcsmiloj.

LA STATO MARILANDO OFICIALE APROBAS ESPERANTON.

Je la 11a de aprilo, 1910, Lia Moŝto Austin L. Crothers, Guberniestro de Marilando, subskribis la leĝoprojekton, kiu permesas la instruadon de Esperanto en la lernejoj publikaj de tiu stato.

Tio ĉi estas la unua okazo en Usono, kiam iu ŝtato oficiale metas Esperanton en ĝia legaro. Tial sendube estos interese al niaj legantoj havi resumon de tiu ĉi leĝoprojekto, kiu nun fariĝis efektiva leĝo, kune kun mallonga redaktaĵo pri la tiel progresema ŝtato Marilando.

La leĝoprojekto estis enkondukata de la

jena antaŭparolo:

"Vidante ke la Internacia Lingvo Esperanto faras efektivan progreson en multaj el la progresemaj nacioj de la mondo, kaj estas aprobita de kelkaj internaciaj kongresoj; kaj "Vidante ke tiu ĉi lingvo kontentigas la

longe sentitan bezonon por simpligata sed supera komunikilo inter la nacioj, ne elpuŝante naciajn lingvojn, sed provizanta duan lingvon al ĉiuj; tial

"Fariĝu leĝo de la Ĝenerala Konsilantaro de Marilando ke en ĉiu distrikta lernejo estu instruataj" (jen estas nomataj la ordinaraj fakoj de lernado) "kaj la elmentoj de agrikultura scienco kaj la Internacia Lingvo Esperanto, povas, laŭ la kontrolo de la ŝtata Konsilantaro pri Edukado, esti aldonitaj al la fakoj, kiuj devas esti instruataj en la Stataj Normalaj Lernejoj, kaj en la lernejoj publikaj de la diversaj regionoj de la ŝtato.

La Stato Marilando estas la plej proksima de la urbo Washington. La tero, sur kiu Washingtono estas fondita, estis cedata de Marilando al Usono por la nacia ĉefurbo.

Estante unu el la originalaj dektri ŝtatoj, Marilando prenis eminentan parton en la batalado por nacia sendependeco, kaj poste, en la konstruado de la nacio. Al la mondo ĝenerala, tamen, la plej gravaj temoj estas ĝiaj estantaj posedaĵoj kaj altirecoj.

De Naturo, Marilando estas grandege favorata je kaj multeco kaj diverseco de produkt-Gia Chesapeake Bay (česepik bej) la plej granda enlanda salakvo en Usono, estas riĉega je fiŝoj kaj ĉasaĵoj. Anasoj kaj aliaj birdoj vizitas ĝiajn bordojn en sia sezono, kaj el ĝiaj akvoj oni povas kapti krabojn, ostrojn, aložojn, perĉojn, haringojn, κ. t. p. Oni povas same rakonti pri la produktemo de la lando. Ĝiaj fruktoj estas bongustegaj kaj multenombraj; fragoj kaj aliaj beroj, persikoj, pomoj, piroj, akvomelonoj, kaj diversaj legomoj troviĝas senmanke.

La orienta bordo estas fama pro siaj bonegaj persikoj: la suda provincoj pro tabako. Tra la tuta ŝtato oni kreskigas maizon, tritikon, kaj aliajn grenojn. Veturante okcidenten, de tajdakvo ĝis la montoj, oni preterpasas ricajn farmbienojn kies produktemo evidentiĝas per la grandegaj kaj belaj grenejoj. Lo montoj enhavas multege da terkarbo.

Pasante de materialaj al intelektaj aferoj, oni trovas tiun ĉi ŝtaton ree multe favorata. Urboj kaj la kamparo havas lernejojn sufiĉe-

Baltimoro, la metropolo, enhavante proksimume 700,000 logantojn, estas la sidejo de la famkonata John Hopkins Universitato. Tiu ĉi urbo estas nomata "La Monumenta Urbo" pro la multeco kaj beleco de ĝiaj monumentoj.

La ŝtata ĉefurbo, Annapoliso, sidante sur duoninsulo apud la rivero Severn, enhavas la "Statan Domon," la Kolegion, de Sto. Johano, kaj la faman Usonan Lernejon por Maraj Militistoj.

Laste, sed ne plej malgrande, religo sin trovas bone zorgata. Belegaj pregejoj ĉie in-

vitas la homaron al preĝoj kaj laŭdoj. Marilando ĝojas ke "La Sesa" okazos la nunan jaron tiel proksime de siaj limoj, kaj klopodos por helpi la urbon Washington en korega bonveno al niaj vizitantoj de multaj -James L. Smiley.

Annapolis, Maryland, Usono.

FRAGMENTOJ

PRI LITERARY CONTEST.

I wish to say a word in relation to the jugantaro of the Literary Contest, which will be a feature of the "Sixth." In 1908 and 1909, the best and ablest Esperantists throughout Europe were selected for judges, as a matter of justice to the writers.

Every writer should send into the Organizing Committee, a list of those whom he would like to have nominated as judges. Of course, some may decline to serve for excellent reasons, but only in this way can justice and satisfaction be guaranteed to the writers, and they are the ones who should, in this general sense, decide this most important point. All Esperantists should be interested and take a just and proper pride in the literary contest, and whether they write upon the proposed themes or not, should suggest to the Organizing Committee names of those they would like to have serve as judges. —J. E. Hamand.

SOUTHWESTERN CONVENTION.

Esperantists and friends of the language will hold a convention at Wichita, Kansas, June 10 and 11. An interesting program has been arranged, in which prominent educators will take part. Dr. Haynes, councilor for Southwestern Division, including Kansas, Arkansas, Oklahoma and Texas, desires as great attendance as possible from each state. More definite information will be sent in response to request, by D. T. Armstrong, secretary, 319 E. Douglas Ave., Wichita.

Portland, Oregon.-Ni havas tie ĉi tre bonan klubon da kvardek anoj kunigita kun la Kristana Unuiĝo por Junaj Viroj. Tiu kunvenas ĉiun jaŭdon vespere por studi la lingvon. Generale estas ĉirkaŭ dekkvin anoj ĉe ĉiu kunveno. Bona progrese estas farata. Krom tiu klubo du aliaj kunvenas en diversaj partoj de la urbo. Unu el tiuj kunvenas ĉiun tagon ĉe la fervoja maŝinejo, dum la tagmeza horo. Tiu estas por la maŝinistoj kiu laboras tie. Por pli bone ellerni esperante kalkuli, jen estas la kanto kiun oni kantas ĉe la kunvenoj de la K. U. J. V. (Y. M. C. A.)

Unu eta, du etaj, tri etaj ĥinoj; Kvar etaj, kvin etaj, ses etaj hinoj; Sep etaj, ok etaj, naŭ etaj ĥinoj; Dek etaj ĥinoj knaboj.

-H. Denlinger. 1445 Garfield Ave., Portland, Oregon.

Stato South Carolina.—Sro. V. C. Dibble, la neniam laciĝanta, skribas ke la klubo en Charleston prezentos la paroladon de Sro. Baker. Li ankaŭ klopodas pri aranĝoj en Columbia, Sumter kaj Marion.

Washington.—Preskaŭ ĉiu eldonisto en Usono povas diri, ke liaj libroj estas en la Biblioteko de Kongreso ĉe Washington, ĉar laŭ la leĝoj pri "copyright" (rajtoj de represado) ĉiu eldonisto devas doni du ekzemplerojn de ĉiu sia libro al la Biblioteko. Tamen, estas al la eldonisto granda surprizo ricevi mendon por libroj, kun pago, kaj ke la Biblioteko mendas esperantajn librojn kaj pagas por ili pruvas, ke iu en oficialujo interesiĝis multege pri Esperanto. peranto.

Patent Medicine Advertising .- Nobody accuses the patent medicine people of visionary philanthropy, and the appearance of a little catalogue by Burroughs, Wellcome & Company of London, advertising their health-producing products in Esperanto, seems an indication that they consider it a very practical affair. Their goods are advertised as for sale only to the trade, but we indulge an optimistic suspicion that they would send to anybody asking it a copy of this pamphlet, Konataj Medicinaj Produktoj. Their address is Snow Hill Buildings, London, E. C.

Tacoma, Wash.-Antaŭ kelkaj monatoj Sro. Arthur Baker, redaktoro de Amerika Esper-antisto, faris tie ĉi publikan paroladon pri Esperanto. Cirkaŭ ducent homoj ĉeestis kaj klare montris entuziasmon en nia kara afero. Multaj homoj nun studas Esperanton en Tacoma, la plejmultaj studas hejme, sed kelkmultaj formis klason, kiu kunvenas ĉiusemajne en The Beutel Business College. Dudek anoj en The Better Business conlege. Butter and aligis. Ili estas plej entuziasmaj kaj tre bone progresas. Ili jam klopodas paroli la lingvon. Laŭ la instruisto, Sro. Fred Rivers, la klaso estas la plej bona kaj progresema, kiun li iam vidis. Kompreneble, oni uzas la lernolibron de Arthur Baker. Post kelkaj semajnoj oni havos festan vesperon, kiam la novanoj konatiĝos kun la aliaj esperantistoj. kiuj jam estas elstudintaj la lingvon. Nunaj oficistoj:

Prezidanto kaj instruisto, Fred Rivers; vicprezidanto. R. R. Mattison; sek-kasisto, Leh-man Wendell. Propaganda Komitato: Prof. A. B. L. Gellermann, Fino. Mabelle Shyleen, Sro. E. A. Peters. Sro. Peters estas raportisto por unu el niaj tagĵurnaloj kaj tial li skribas pri nia afero kiel eble plej ofte. Nova klaso baldaŭ fondiĝos en la norda parto de la urbo. -Lehman Wendell.

LA MONDO BEZONAS ESPERANTON

CLARENCE L. DEAN

Sinjoro Bernard Long, en sia bona broŝuro, "Is Esperanto Worth Learning?" (Ĉu Esperanto valoras la lernadon?), diras pri la granda bezono, kiun la popoloj Eŭropaj havas por Esperanto, ke "ekzistas en Svislando tri lingvoj (la Franca, la Germana kaj la Itala), kaj ke en Aŭstrio la duoblo de tiu ĉi numero estas parolata." Vere Sro. Long ne pligrandigas la faktojn. Antaŭ kelkaj jaroj mi vojaĝis en Svislando por aferoj, kaj mi trovis kvar apartajn lingvojn (mi ne parolas pri dialektoj, el kiuj pli granda nombro ekzistas en Svislando), la tri diritajn kaj ankaŭ la Reo-Romanan, lingvon devenanta rekte de la antikva Latina, kiun ĉirkaŭ 100,000 montanoj parolas kiel sian patran lingvon. Kiuj el la multaj lingvoj de Aŭstrio estas la ses, pri kiuj Sro. Long parolas, mi ne scias, sed tie ĉi ankaŭ li estas tro modesta. Kiam mi loĝis in Vieno, antaŭ kelkaj jaroj, oni ofte diris ke en la regno Aŭstrio-Hungarujo 21 apartaj lingvoj estas parolataj, kaj ke la Imperiestro-Reĝo Franz-Josef parolas ilin ĉiujn. Nomi ilin mi ne povas, sed mi ne dubas ke ekzistas tiom, ĉar mi mem uzis 13 el ili por fari anoncojn per afiŝoj, broŝuroj, flugfolioj kaj ĵurnaloj, kaj en kelkajn aliajn miaj anoncoj estis tradukitaj de la redaktoroj de distriktaj ĵurnaloj. Krom la lingvoj Germana, Itala, kaj Magiara (la lastan oni kutime nomas erare Hungara), kiuj estas la plej bone konataj ekster la regno, mi trovis absolute necesa la uzadon de Ceka, Pola, Litova, Rutena, Juda (Yiddisch), Ru-Slovena, Slovaka, Serba kaj Kroata lingvoj. Kioma estas la akurata numero de la Slavaj lingvoi, kun la Slovaka, la Slovena kaj la Slavona, kies nomoj estas tiel instruige samliterecaj, mi neniam lernis, sed ili estas multe pli multaj ol supozas la popoloj de okcidenta Eŭropo kaj Ameriko, kiuj kutime pen-

sas ke ĉiuj estas entenataj en le Ĉeka, Pola, Slovaka kaj Serbo-Kroata. trovis dum mia lasta vojaĝo alian ĝis tiam de mi nekonatan membron de la Slava lingvogrupo, la Vendan, kiu similas sed diferencas de la Slovaka. Oni supozas ĝenerale ke la Slovena parolata en la ĉirkaŭaĵo de Laibach estas identa kun la Slavona, sed mi trovis ke oni ne komprenis en Laibach la Slavonain anoncojn, kiuj estis faritaj en Esseg, kaj ke estis necese tradukigi ilin denove slo-Simile oni generale parolas pri la Serbo-Kroata lingvo, sed en Agram la Kroataj broŝuroj estis presitaj per latinaj literoj, kaj por la Serboj de suda Hungarujo estis necese denove tradukigi ilin, kaj presigi ilin per specialaj tipoj.

Mi trovis ke ekzistas en Aŭstrio tri lingvoj, kiuj devenas rekte el la antikva latina lingvo. Tiuj estas la Friulana, la Ladina kaj la Romana. La Friulana estas parolata en la regiono ĉirkaŭ Udine en nord-orienta Italujo, kaj en la ĉirkaŭaĵo de Görz' (Gorizia) en suda Aŭstrio. Ladina (Ladinisch) estas simila sed tre diferencigita lingvo, parolata en la montoj sude de Bozen', en la regiono de la Dolomitoj. Romana (Romanisch) similas la Reto-Romanan, kaj estas parolata de la montaranoj proksime de la landlimo de la svisa kantono Grissons.

Mi neniam forgesos mian unuan afvojaĝon ekster angleparolantaj Mi elvojaĝis el Londono por landoj. fari supozeble mallongan vojaĝon en Germanujon. Teorie mi konis la germanan lingvon. Oni supoze instruis ĝin al mi en la lernejo, kaj antaŭ la foriro el Londono mi laboreme tralegis malgrandan gvidlibreton anglo-germanan. kredis ke mi konas sufiĉe la germanan lingvon, kaj, krom tio, ĉu oni ne parolas la anglan lingvon ĉie en la mondo? Sed mia kono pri la germana lingvo rompiĝis en la germana landlima impostejo, kaj

ankaŭ tie malaperis mia kredo pri la tutmondeco de la angla lingvo. Car mi havis pakaĵojn kun mi, por kiuj mi devis pagi impostojn, kaj ĉar mi ne povis min kompreniĝi, mi devis transsendigi miajn pakaĵojn oficiale fermitaj kaj sigelitaj, kaj redemandi ilin en Hamburgo. ĉio estis facile farebla. Ĝi estas granda havena urbo, kaj havas grandan britan kaj amerikan negocon, kaj mi feliĉe trovis multajn angle-parolantojn. poste en Berlino, spite ke ĝi estas la ĉefurbo, kaj estas vizitata de multaj Angloj kaj Usonanoj, kaj spite ke ĉiu granda hotelo havas pordiston kaj kelnerojn kiuj parolas angle, mi ne povis multe min servi per tiu ĉi lingvo en afer-Post Berlino, mi vizitis Kosten', malgrandan urbeton en la provinco Pozen', kaj tie nova surprizo atendis min; la plimulto de la loĝantoj ne povas paroli eĉ germane, sed nur pole. solan komerciston mi trovis, kiu konis eble cent vortojn anglajn, sed ne povis formi frazojn, kaj eĉ malpli pri la franca lingvo sciis. Germane mi parolis apenaŭ pli ol li angle, kaj france malpli ol li. Nia interparolado fariĝis per disigitaj unusilabaj vortoj trilingvaj.

Reveninte al Berlino mi ricevis leteron ordonantan ke mi restu tie, kaj entenantan longan liston de aferoj pri kiuj mi devos zorgi. Oni ankaŭ ne permesis al mi ke mi dungu tradukiston, escepte je mia propra elspezo, kaj sekve mi trovis min en situacio, kie estas necesege ke mi lernu paroli germane, por daŭrigi miajn vivrimedojn. Ne ekzistas pli fortan inciton, kaj mi lernis en severega kaj praktika lernejo. Tiutempe la sudafrika milito faris la nomon "anglo" malŝatata en Eŭropo. Lia Imperiestra Moŝto Wilhelm estis ĵus sendinta sian famekonatan telegramon al Presidento Kruger, kaj en Germanujo oni ne multe amis la anglojn, kaj apenaŭ pli multe ŝatis la angle parolantajn amerikanojn. Tamen mi pasigis du tre agrablajn jarojn en tiu lando. Generale mi estis bone akceptata de la Germanoj, por kiuj mi havas veran admiron. La severe oficialaj farmanieroj kaj necedemo de la ĉiupovaj policistoj, aparte en norda Germanujo, ne estas laŭ la gusto de angloj aŭ Amerikanoj, sed

oni devas konfesi ke la regno estas bone regata kaj la leĝoj bone kaj juste administrataj. Ordo kaj pureco troviĝas ĉie en la regno.

Dum la daŭro de mia unua jaro en Germanujo mi iris al Essen', granda ferfabrikeja urbo, por ricevi ian policistan permeson. La policestro estis Hanoverano, kaj al mi ne estis malfacile kompreni lin kaj esti komprenata de li. Sed estis necese ke la urbestro, granda, forta, fortika, belega enlandano, sub-skribu la dokumenton. Li havis Vest-(Westphalian) pronuncon, tiel fortan kaj elspiraĵ-malŝparantan ke fariĝis malgranda uragano ĉirkaŭ li, kiam li parolis. Mi tute ne komprenis lin, kaj por mi liaj vortoj povus esti hinaj aŭ talaj (Taal). Post kiam li faris kelkajn demandojn, al kiuj mi ne povis inteli-gente respondi, li koleretiĝis, kaj demandis malbonhumore ĉu mi povas "Bedaŭrinde," mi reparoli france. spondis, "malpli ol mi parolas germane." "Kian lingvon, do vi povas paroli?" "La anglan, via urbestra Moŝto." Li sidigis sin posten en sian seĝon, trapikis min per sia severa rigardo, kaj diris: "Nu! Vi vere estas bonega riprezantanto por fari aferojn en germanaj landoj. Vi ne povas diri sufice por malutili vian firmon." Tiam li ridis je sia propra spritaĵo, ree fariĝis bonhumora, kaj sen pluaj vortoj subskribis la dokumenton.

Mian perditan fidon pri la tutmondeco de la angla lingvo anstataŭis en mia penso kredo ke la germana lingvo sufiĉas por travojaĝi la tutan mezan kaj orientan partojn de Eŭropo. En la grandaj germanaj urboj oni ofte tion diris al mi, kaj mi kvazaŭ forgesis la negermaneco de Kosten en la provinco Pozen'. alvenis Vienon, pensante, kiel estas erare pensata de la plimulto de alilanduloj, ke la germana estas la oficiala lingvo por la tuta aŭstrio-hungara regno, kaj ke oni povas fari ĉiujn aferojn oficialajn kaj negocajn per ĝia sola rimedo. En Vieno estis tiel, kaj ankaŭ en la germanalingvaj partoj de Aŭstrio. Sed dum mia unua vizito en Budapest mi seniluziiĝis. En la hoteloj la pordistoj kaj kelneroj parolas angle, france, germane, kaj ankaŭ ofte ruse, krom magiare. Sed en la

urbo oni ne bonvolonte parolis alian lingvon krom la magiaran, kaj mi trovis tre malfacila la traktadon de aferoj. Tiutempe la ŝovanista reakcio kaj kontraŭbatalo kontraŭ la germana lingvo kaj aŭstria influo estis multe malpli fortaj ol nuntempe, sed eĉ tiam la tramveturigistoj kaj la policanoj tute rifuzis respondi al demandoj ne faritaj magiare. Mi bezonis ian polican permeson, kaj iris al la prezidio (polica kazerno kaj oficejo) por ricevi ĝin. Vidante gendarmon deĵorantan gardostaranta en la korto, mi petis ke li montru al mi la vojon. Sed bedaŭrinde mi petis germane, kaj li faris ian respondon, aŭ rimarkon, magiare. Nature mi ne komprenis. Ree mi demandis germane, ree magiare re-Post kelkaj senutilaj klospondis li. podoj havigi al mia demando germanan respondon, mi ĉirkaŭrigardis, kaj vidante du bonvestitajn kaj ŝajne bonedukitajn virojn sidantaj post vitra pordo en teretaĝa oficejo mi iris rekte al ili. La gardstaranto penis interveni, sed mi estis iom pli proksima de la pordo, kaj alvenis antaŭ li. "Sinjoroj," diris mi germane, "mi estas amerikano, kiu bedaŭrinde ne konas unu vorton magiaran, kaj parolas nur angle kaj tre malmulte germane. Estas necese ke mi vidu la komisaron B. Cu vi bonvole montros al mi la vojon?" Ĉe la unua germana vorto iliaj brovoj malheliĝis, sed kiam ili aŭdis la vorton "Amerikano," kaj komprenis ke mi ne estas unu el la malamitaj aŭstrianoj, aŭ c la apenaŭ malpli malŝatataj germanoj, ili montris sin tute afablaj kaj unu el ili kondukis min al la de mi dezirata pordo. Komisara B., aŭdinte mian demandon, alvokis sian sekretarion, homon ŝajne multe malpli bonedukita ol li, por traduki. Nia interparolado fariĝis sole per la pero de la sekretario, kiu magiare transdiris la demandojn de mi faritajn germana, kaj germane transdiris la respondojn de la komisaro faritajn mag-Sed mi sentis ke tiu komprenis ia germanan, ĉar kelkfoje li respondis antaŭ ol la tradukanto ripetis la demandojn. La postmorgaŭan tagon, en ia kafejo, konata advokato, al kiu mi alportis rekomendajn literojn, min prezentis, kiel amikon el Ameriko, al Kom-

isaro B. Tiam mi lernis ke la policisto estas universitatano, kiu perfekte parolas germane. Private li tre gentile interparolis kun mi per tiu lingvo, sed, kiam mi denove vizitis lin pri ateroj oficialaj, li kiel oficisto parolis nur magiare kaj denove uzis la peron de lia sekretariotradukisto. Tio fariĝis en la jaro 1899a. Kvin jaroj poste mi revenis en Budapest, kaj tiam tiuj viroj ambaŭ portis sur la brusto tulipojn, signojn ke ili estas patriotuloj, kaj anoj de la magiara patriota ligo, kies devizo estas "Magiarlando por la magiaroj." (Tiun ĉi frazon oni eksterlande tradukas erare kiel "Hungarujo por la Hungaroj.") Ni tri denove konvenis en kafejo, sed tiutempe ni ne tiel facile kaj afable interparolis, ĉar, dum ili ambaŭ parolis germane al mi, inter si ili reciproke parolis nur magiare, kaj unu el ili tradukis por mi. Tulipanoj, kiel magiaraj patriotoj, devas paroli nur magiare al loĝantoj en Hungar-Krom Magiaroj loĝas tie ankaŭ Germanoj, Serboj, Rumanoj, Rutenoj, Judoj parolante jude (Yiddish), Poloj, Slovakoj, Kroatoj, Slovenoj, kaj Litovoj. el kiuj multaj kompreneble parolas nur siajn gepatrajn lingvojn, sed spite ke la Magiaroj estas nur 8,600,000 el la 16,-800,000 loĝantoj, la tulip-patriotoj priĵuras ne paroli alian lingvon al enlandano ol la magiaran. Car Magiaroj estras la juĝejojn, la lernejojn kaj ĉiujn aliajn oficialajn instituciojn, kaj nur al patriotoj estas donataj la oficoj, tial oni facile komprenas ke la sorto de anoj de aliaj rasoj, kiuj parolas nur la gepatran lingvon, ne estas tute felica. Mi ciam trovis ke estis tre utile, kiam mi parolis germane, klarigi mian anglan devenon kaj amerikan naciecon.

Ĉu mi lernis la magiaran lingvon? Mi pene provis ĝin, pro la utilo ĝi alportus al mi ĉe la oficistoj, sed mi prosperis lerni nur malmultajn vortojn kaj frazojn. Mi povis klarigi ke mi estas Amerikano (Amerikai-ur), ke mi parolas angle (angol), kaj malmulte germane (nemet), kaj ke mi lernas la magiaran lingvon kaj esperas ke ĉe la revido mi parolos ĝin. Ankaŭ kelkajn vortojn por havigi al mi manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, aĉeti fervojbiletojn, kaj fari demandojn pri la vojo,

mi lernis, sed plue mi ne povis. La lingvo estas tre malfacile akirebla por la okcident-eŭropanoj. Ĝi estas aglutineca lingvo de mongola deveno, kaj ne similas ian ajn lingvon de mi konatan. Oni diras ke ĝi parencas la finnan kaj la turkan lingvojn.

Iun dimanĉon mi estis okaze en malgranda urbo nomata de la Germanoj Neusatz (Nojsac), kaj de la Magiaroj Ujvidek (Ŭividek) en suda Hungarujo proksime de la serba landlimo, kaj sidis en kafejo, kie estis okazanta politika konveno, por aŭdi raporton pri la klopodoj pri urbaj aferoj de ia delegacio ĵus reveninta de la ĉefurbo Budapest. Kvar lingvoj estis uzataj de la partoprenantoj, kaj ĉiujn kvar uzis la urbestro, farante elokventan paroladon, ĉar li flue parolis la lingvojn de ĉiuj siaj elektantoj. morgaŭan tagon mi iris pritrakti iajn aferojn kun li, kaj li afable demandis kian lingvon mi preferas uzi. "Prefere la anglan," mi respondis. "Mi- bedaŭras— mi— malmulte— konas— ĝin," li komencis balbute, "sed mi parolas itale, aŭ france, se tio utilas vin." Mi ne dubis ke li tiel bone parolas tiujn ĉi du lingvojn, kiel la kvar kiujn mi aŭdis lin uzanta la dimanĉon.

En multaj hungarujaj urboj tri, kvar, kaj eĉ kvin lingvoj estas parolataj, inklusive la lingvojn de la najbaroj kam-Ho! Ve! Kiom de malfacilaĵojn mi trovis pri la lingvoj en Hungarujo! Estis necese fari anoncojn en preskaŭ ĉiuj lingvoj parolataj en la reĝlando, kaj ofte estis tre malfacile difini ĝuste la limojn de ĉiu lingvo, kaj ne unu fojon mi premis senintence la piedfingrojn de iuj trosentemaj magiaraj patriotoj, aŭ de iuj fervoraj kontraŭmagi-Ofte estis necese uzi parte germanajn anoncojn, parte rumanajn, parte magiarajn, kaj se oni erare disdonis magiarajn broŝurojn en la germanaj kvartaloj, aŭ male, akraj plendoj kaj eĉ insultoj sekvis. Eĉ uzado de unu slava lingvo anstataŭ alia ofte entrenigis malutilojn. La slavoj estas pli ol kvarono de la loĝantoj de Hungarujo, sed inter la apartaj slavaj rasoj ĉio ne estas paco kaj interkonsento, kai tial ili havas tre malgrandan politikan influon.

El ĉiuj slavaj lingvoj parolataj en la

regno Aŭstrio-Hungarujo supereco apartenas al tri-la Pola, la Ceka kaj la Kroata. Inter tiuj ĉi tri granda konkurado ekzistas pri kiu el ĉiuj estas la plej bona, kiu havas la plej grandan literaturecon, kaj kiu devas esti adoptata kiel la panslava lingvo. La poloj diras ke tio estas nature sia propra lingvo; la ĉekoj diras sia, kaj la Kroatoj sia, kaj ankaŭ aliaj slavaj rasoj ne konsentas ke iu el tiuj ĉi tri superas ilian propran lingvon aŭ dialekton. Se ĉiuj slavoj povus unuiĝi, ili havus superregon en la duobla regno, sed ĉiuj ĝisnunaj klopodoj elekti komunan lingvon kaj agi komune pri politikaj aferoj nuliĝis pro la reciproka ĵaluzo. En la regno Bohemio kaj la graflando Moravio mi trovis preskaŭ la samajn kondiĉojn pri la ĉeka lingvo, kiel en Hungarujo pri la magiaran. En la germanaj partoj oni ne toleras ĉekajn anoncojn, kaj male germanaj anoncoj tre kolerigas la ĉekon. En Praho tiutempe ekzistis, kaj eble ankoraŭ ekzistas du afiŝistoj, el kiuj unu algluas nur ĉekajn afiŝojn kaj la alia nur germanajn. En Pilsen (ĉek., Pilzen) oni postulis ke ni forprenu ĉekan afiŝon okaze algluitan sur muro sub la fenestroj de germana urbsubestro, kaj kiam ni anstataŭigis ĝin per germana afiŝo, la ĉekoj faris laŭtan malkontentan bruon kaj por fari pacon ni estis devigata kovri per ĉeke redaktitaj anoncoj kelkajn germanajn afiŝojn en ĉekaj kvartaloj. urbo de Galicio ni ofte trovis necesa la uzadon samtempan de polaj, germanaj, rutenaj kaj judaj anoncoj.

Vere la Aŭstro-Hungarujo regno tre bezonas neŭtralan helpan lingvon, kaj la fortaj reakcioj ĉe la magiaroj, ĉekoj, poloj kaj kroatoj faras tiun bezonon senĉese pli kaj pli granda. Vidinte la kondiĉojn tie oni ne miras ke la trovinto de Esperanto naskiĝis en lando kie ekzistas io simila. La surpriziga fakto estas ke Dro. Zamenhof, naskiĝinta polo, havis sufiĉe grandan genion, ke li konsciiĝis ke la superregantaj lingvoj ne estas la slavaj, sed la latina kaj germanika lingvofamilioj, kaj ke, komprenante ke la veraj bezonoj de ĉiuj homrasoj estas io supera al la tiel dirita antaŭpuŝado de la propra lingvo, li tiel bone servis la plej bonan patriotismon per la eltrovo de la vera

lingvo internacia.

LITERATURO

THUGATER.*

Thugater melkis la bovinojn de sia patro, kaj bone ŝi melkis, ĉar lakto portita hejmen de ŝi enhavis pli da butero ol lakto portita hejmen de ŝiaj fratoj. Mi vin rakontos la kialon kaj bone atentu, por ke vi ĝin sciu . . . se iam vi irus melki. Sed mi ne diros ĝin por ke vi melku same kiel Thugater, sed por montri al vi la ekzemplon de ŝiaj fratoj, kiuj, melkante malpli bone, tamen agis pli bone, almenaŭ pli prudente.

Antaŭ ol la junaj gemelkistoj eniras herbejon, eĉ longe antaŭ tiu momento la bovinoj atendas al la krado por esti senigitaj de la superŝarĝo, kiun ili, verdire, preparis por siaj idoj. Sed homoj formanĝas tiujn idojn kaj tial tro multe da

lakto troviĝas en la mamoj.

Kio nun okazas dum la bovinoj kun idiotaj mienoj atendas antaŭ la krado? Starantaj trankvile, la plej malpeza parto de la lakto, la kremo, grasaĵo, butero, sin ŝovas supren kaj kuŝas do plej malproksime de la mamo. Tiu kiu melkas pacience ĝis la fino, portos hejmen grasan lakton; tiu kiu rapidiĝas, lasas la kremon. Kaj aŭdu-dum Thugater ne rapidiĝis, ŝiaj fratoj tamen agis tute alie, pretendante ke ili havas rajton je io alia ol melki bovinojn de sia patro. Thugater ne pensis al tiu rajto.
"Mia patro instruis min pafi per sago

kaj arko," diris unu el la fratoj. "Kaj mi povas vivi per la ĉasado, mi volas migri en la mondon kaj labori por mia

propra profito."

"Al mi li instruis fiŝi," diris la dua. "Mi estus freneza, se mi ĉiam melkus

por aliulo."

"Kaj al mi li montris kiel oni konstruas ŝipon," diris la tria. "Mi dehakos

*La signifo de la greka vorto Thugater estas: melkistino.

arbon, eniĝos en ĝin sur la akvo. volas vidi kio troviĝas trans la lago."

"Mi deziras loĝi kune kun blonda virino," diris la kvara, "por ke mi havu propran domon kun 'thugateroj' kiuj

melkos por mi."

Tiamaniere ĉiu el la fratoj havis deziron, preferon, volon. Kaj iliaj emoj tiele plenigis ilin ke ili ne donis al si la tempon kunpreni la kremon kiun la tute malkonsolataj bovinoj estis devigataj reteni, sen ia utilo per iu.

Sed Thugater melkis ĝis la lasta guto. "Patro," fine kriis la fratoj, "ni for-

"Kiu melkos?" demandis la patro.

"Nu . . . Thugater!"
"Sed kiel estos se ankaŭ ŝi deziros marvojaĝi, fiŝi, ĉasi, vidi la mondon? Kiel estos se ankaŭ ŝin trafos la ideo, loĝi kune kun iu blonda aŭ bruna, por ke ankaŭ ŝi havu propran domon kun tio kio apartenas al ĝi? Mi povas malhavi vin sed ne ŝin, ĉar la lakto, portita hejmen de ŝi estas tre grasa."

Tiam la filoj diris post reciproka pri-

penso:

'Patro, instruu al ŝi nenion! Tiam ŝi daŭrigos melki ĝis la fino de siaj tagoj. Ne montru al ŝi, kiel la streĉita kordo, malstreĉante, forpafos sagon; tiam ŝi ne deziros ĉasi. Kaŝu por ŝi la ecojn de fiŝoj, kiuj englutas akran hokon, kovritan per ia alogaĵo. Ne montru al ŝi kiamaniere oni kavigas arbon kaj forglitas per ĝi trans la lagon; tiamaniere ŝi ne sopiros tiun flankon. Kaj neniam sciigu al ŝi kiel per blondulo aŭ brunulo ŝi povus akiri propran domon kun tio kio apartenas al ĝi. Neniam rakontu tion al ŝi, patro, tiam ŝi restos kun vi kaj lakto de viaj bovinoj estos grasa! Dume . . lasu nin foriri, patro, ĉiu laŭ sia deziro."

Tiel parolis la filoj. Sed la patro, estante tre singardema viro, rekomencis: "Karaj miaj, kiu malhelpos ke ŝi scios kion mi ne instruis al ŝi? Kiel estos se ŝi vidos flosi libelon sur superakvanta branĉo? Kiel estos se la streĉita fadeno de ŝia spinaĵo reprenos sian antaŭan longaĵon kaj rapide malstreĉante, kvazaŭ okaze forpelas la fadenejon de ŝia kordplektilo? Kiel estos se ŝi, al la bordo de la rivereto, atente rigardos la fiŝon, kiu vane mordas al tordanta vermeto sed mishaptante pro malbone direktata avideco, enhavos en la akra artikŝelo de la kano? Kaj fine, kiel estos se ŝi trovos nesteton kiun alaŭdoj konstruis al si en la trifolio dum la monato Majo?"

La filoj denove meditis kaj diris:

"Si nenion lernos de ĝi, patro! Si estas tro malsaĝa ĉerpi avidecon el sciencon. Ni ankaŭ scius nenion se vi nenion estus dirinta al ni."

Sed la patro respondis:

"Ne, ŝi ne estas malsaĝa! Mi timos ke ŝi lernos tion per si mem, kion vi ne lernis sen mi. Malsaĝa tute ne estas Thugater!"

Tiam la filoj denove pripensis . . . tiun ĉi fojon eĉ pli profunde . . . kaj

fine ili diris:

"Patro, diru al ŝi ke scii, kompreni kaj deziri estas 'peko' por knabino!"

Tiun ĉi fojon la tre singardema patro kontentiĝis. Li permesis al siaj filoj fiŝkapti . . . ĉasi . . . migri . . . edziĝi . . ., iri ĉien.

Kaj tiel ĝi restis ĝis tiu ĉi tago.

-El holanda lingvo laŭ "Multatuli" tradukis Nella Boon por Holanda Pioniro.

RAKONTETO.

Mi estis en mia studejo. La aliaj familianoj estis irintaj al siaj litoj kaj laŭ mia kutimo en tiu ĉi parto de la nokto mi studis Esperanton. Mi faris tion preskaŭ sekrete, ĉar je la tempo pri kiu mi parolas mi ŝajnis esti la sola Esperantisto en mia urbo, kaj se oni parolus pri la "kara lingvo" la aŭskultantoj aŭ rigardus scivole, aŭ, alie, kompatema rideto aperus sur iliaj vizaĝoj.

Post mia kutima studado kaj legado mi fermis la librojn, mallumigis la ĉambron kaj meditis. En la mezo de sensenca revadaĵo mi mallaŭte murmuris: "Vi ne estas viro fidela al la Zamenhofa idealismo, alie vi ne povus fari tion." Dufoje mi diris tion; tiam mi ekdormis, kaj sonĝis pri multe da konfuza sensencaĵo, je la fino de kio ŝajnis ke mi ree diris: "Vi ne estas viro fidela al la Zamenhofa idealismo; alie vi ne povus fari tion."

Tiam ŝajnis al mi ke apude estis brueto, kaj tuj lumeto ekbrilis tra la ĉambro. Mi vekiĝis en ŝajne nebuleta atmosfero, tra kiu estis videbla la formo de viro kun revolvero en la mano. Preskaŭ nekonscie mi parolis: "Vi ne estas viro fidela al la Zamenhofa fundamento; alie vi ne povus fari tion."

La viro eksaltis, enmetis la revolveron ne la ingon, kaj diris: "Ho, pardonu min, sinjoro! se mi estus sciinta la loĝejon de iu esperantisto tie ĉi mi certe ne estus farinta tion ĉi. Antaŭ ol vi juĝos min, me petas, ke vi aŭskultu mian historion.

"Mia naskiĝloko estis en Rusujo. Tie, antaŭ kelkaj jaroj, mi studis Esperanton, kaj, ne sciante eĉ unuan vorton anglan, kaj, opiniante ke per Esperanto mi povus kompreniĝi kaj prosperi, mi alvenis al Mi senĉese penis eltrovi tiu ĉi urbo. esperantistojn kaj ankaŭ obteni oficon, sed ĉiam sensukcese. Fine mi ne havis eĉ unu cendon kaj mi malsatiĝis, ho, tiel malsata, ke malbonaj pensoj plenigis mian kapon kaj mi decidis uzi mian revolveron por obteni sufiĉe da mono por pagi la elspezojn de la vojaĝo hejmen. "Sinjoro, mia rakonteto finiĝas. Faru al mi kiel vi deziras."

Mi premkaptis lian manon, kaj kun okuloj malsekaj pro lia kortuŝa kaj maldika vizaĝo mi diris: "Mia kompatinda amiko, mi kondukos vin al hoteleto kie vi povos manĝi kaj dormi pace, kaj morgaŭ mi penos trovi por vi okupadon. La sekreto de tiu ĉi nokto estas tute nia kaj devas aparteni sole al ni."

Tiam voĉo el la apuda ĉambro diris angle: "Paĉjo kara, estas sufiĉe malfrue ĉesi laŭtan paroladon de Esperanto—ĉu ne?" Mi respondis: "Jes, karulino, mi iomete promenos, por ke mi bone dormu, kaj tiam mi kuŝiĝos."

Farante mansignon al la viro mi kviete malsupreniris, kaj plenumis mian promeson. Mi obtenis oficon por li kun mia firmo; li tre bone prosperis, kaj la sukcesa disvastiĝo de Esperanto tie ĉi pleje okazis per liaj senĉesaj penadoj. Ho ve! mi nun estas la kulpulo, ĉar mi malkaŝis la sekreton!—Henry W. Fisher.

LA SANKTA MILITO!

Iu artisto, lerta pri tiu temo, iu genia buĉisto, Sro. de Moltke, respondis iam, al la delegitoj de la Paco, la jenajn

strangajn vortojn:

"La Milito estas sankta, de lia starigo, ĝi estas unu el la netuŝeblaj leĝoj de la mondo; ĝi konservadas ĉe la homoj, la plej noblajn kaj altajn sentojn, la honoron, la sindonemecon, la virton, la kuraĝon, kaj malhelpas, unuvorte, fali en la

plej malbelegan materialismon."

Tiel, kuniĝi en bandoj de 400,000 homoj, marŝadi tage nokte sen ripozo, nenion pensi, nenion studi, nenion lerni, nenion legi, al neniu utili, putriĝi de malpureco, kuŝiĝi en la ŝlimo, vivi kiel la brutoj en senfina stulteco, prirabadi la urbojn, bruligi la vilaĝojn, ruinigi la popolojn, poste, renkonti alian bandon el homa viando, antaŭensalti sur ĝin, fari lagojn el sango, kampojn el pistita karno miksita al la tero ruĝigita, amasojn da kadavroj, havi la brakojn aŭ la krurojn forportitajn, la cerbon dispremigitan, sen profito por iu, kaj mortaĉi en ia kampangulo, dum viaj gepatroj, via edzino kaj viaj infanoj mortas pro malsato. . . . Jen kion oni nomas ne fali en la plej malbelegan materialismon!

La "homoj de milito" estas la vundoj de la homa gento. Ni bataladas kontraŭ la naturo, la nescio, kontraŭ ĉiuspecaj baroj, por plibonigi nian mizeran vivon. Kelkaj homoj, bonfarantoj, scienculoj, eluzas sian sanon, laborante, plilarĝigante la sciencon, donante ĉiutage al sia

patrujo, bonstaton kaj fortecon.

La milito alvenas, post ses monatoj la generaloj jam detruis 20 jarojn de pen-

ado, pacienco kaj genio.

Jen kion oni nomas ne fali en la plej malbelegan materialismon.—Laŭ Maupassant tradukis H. Van Etten por The British Esperantist.

KUMAGAI.

Estis krepusko, kiam virino sin aperigis en tendaron de la batalkampo. Si estis ankoraŭ juna malgraŭ la ŝajno mezaĝa. Si estis perdiĝanta en profunda pensado, kiam lacega militisto revenis en sian ripozlokon post taga batalado. Grandega estis lia miro ricevi bonakcepton de la edzino, kiun li kredis restanta dome en la malproksima provinco.

"Ĉu mi ne diris al vi, ke vi restadu dome? Kaj ĉu vi ne scias, ke virino estas malpermesata en batala tendaro?"

"Tion mi bone scias, karulo mia, kaj ankaŭ mi scias, ke vi forte konfidas je mi. Sed tio ĉi estas la unua eliro de nia kara fileto sur la batalkampon, kaj la zorgema patrina koro, batanta pro amo en mia brusto, min altiris ĉi-tien por aŭdi pri lia sorto."

"Bone, supozu nun, ke li estis morti-

gita. Kion vi faros?"

"Se li mortis kiel bona kaj brava mil-

itisto, mi sentus min fiera pri li."

"Prave dirita. Mi estas kontenta tion aŭdi. Nun mi rakontos al vi pri nia lasta batalado terurega. Niaj fidelaj soldatoj estis batalantaj ĉi-tie kaj tie. Nia celo estis mortigi la ĉefon de l'armeo de nia malamiko. Kiam mi estis batalanta en la plej densa batalloko, alvenis rajdanta juna militisto kun eleganta, nobela mieno. Mi sentis min korprema mortigi tiel belan junulon. Sed estis mia devo lin mortigi, ĉar li estis unu el la kondukantoj de niaj malamikoj. Ve, fine, lin mi mortigis kun la koro plena je bedaŭro kaj kompato."

"Kaj lia nomo?"
"Atsumori."

Apenaŭ la lasta silabo elparoliĝis, kiam subite ekbrilis glava klingo de malantaŭ ili kaj virina ekscitita voĉo ekkriis:

"Vi mortigis mian filon! Ho, mia fileto! Nun, virino, helpu min revenĝi al tiu via edzo! Vi kruela, malfidela viro! Estu preta ricevi ekfrapojn de lia patrino!"

La militisto estis denove mirigita. Si estis la edzino de lia unua mastro. Li do respekte kliniĝis antaŭ ŝi kaj diris:

"Ha, Sinjorino, ne estas mia kulpo, ke mi mortigis lin, vian fileton. Estis vere terurega batalo, kaj mi nur faris, kvankam kun bedaŭro kaj ĉagreno, mian devon por mia nuna mastro. Aŭskultu min, Sinjorino, mi petas, estu trankvila; ĵus antaŭ la morto, via filo petis min transdoni tiun ĉi fluton al vi kiel sian Ho, kiel nobla kaj brava memoraĵon. estis lia morto! Mi diris al li—Tuj forkuru de tie ĉi, mi petas, ĉar mi ne volas vin mortigi. Sed tiam li respondis trankvile:—Ne, pli mi volas esti mortigita de vi, tiel brava kaj fama militisto, ol de iu alia negrava soldato. Mi nur bedaŭras, ke mi ne povas plu vidi mian patrinon. Mi petas, diru al ŝi, ke ŝi estu zorgema pri si mem, kiun mi postlasas sola en tiu ĉi mondo. Tiuj ĉi estis liaj lastaj vortoj, ĉar tiam li pretigis sin kviete por esti senkapigita. Lian kapon, kiun mi portas, mi tuj montros al nia armeestro. Nun, mia edzino zorgos pri vi kontraŭ viaj malamikoj; cetere, pli bone estus se vi foriros."

"Ho! Sinjoro," ŝi ekkrias, "Sinjoro, mia koro rompiĝas, mi estas konfuzita. Por mia lasta peto, havu bonecon montri al mi la kapon de mia mortigita fileto."

"Jes, Sinjorino, sed poste, ĉar mi devas unue ĝin prezenti antaŭ nia armeestro."

"Ho, mia edzo," diris la edzino, "kiel penige kaj maldolĉe estis por vi senkapigi la filon de via eksmastro! Kaj vi, Sinjorino, mi vin petas, forgesu ĉion estintan, kaj ne plu malĝoju, ĉar via filo mortis veran militistan morton."

"Jes, ĝuste kiel ŝi diras. Pardonu al mi mian kruelan agon. Nur atendu ĝis kiam mi revenos de nia armeestro."

Klara voĉo eksonis de post la tendo: "Nenecese estas elveni, mi mem tien iros ekzameni la kapon." Kaj aperis neatendite la armeestro Princo Yoshitsune.

La geedzoj kliniĝas kun alta respekto. "Ho, Via Estra Moŝto, iam vi alpendigis al branĉo de la ĉerizarbo afiŝon surskribitan: Kiu detranĉos junan branĉeton de tiu ĉi ĉerizarbo, havus sian kapon ankaŭ detranĉitan. Nun mi kredas, ke mi ekkomprenis ĝian signifon."

Tiel dirante, la militisto alportis la afistabulon kaj la keston, en kiu estas tenata la kapo de l'juna mortigito, kaj ilin metis antaŭ la armeestro. Tiu ĉi ekzamenis la kapon kun la esprimo de profunda sento kaj diris:

"Bone farita, Kumagai, vi ĝuste legis mian afiŝon, kaj pro tio mi estas kontenta."

"Koran dankon, feliĉa mi estas ricevi la aprobon de Via Moŝto. Nun mia petego, donu al mi ĉiaman forpermeson, pri kio jam de longe mi vin petadis."

"Tio ja estas grava perdo por mi, sed nun mi ne povas plu vin deteni. Nu, montru tiun ĉi kapon al tiu virino, kiu deziras ĝin vidi."

La ambaŭ virinoj rigardas la enhavon de l'kesto. Iliaj okuloj fiksiĝas sur la kapo, kiu ŝajnas ankoraŭ kvazaŭ vivanta. Dolĉa, bela, trankvila, kaj kvazaŭdormanta estis la vizaĝo senviva!

Ili alproksimiĝis, iom post iom, silente kaj serioze. La vizaĝo de l'edzino de Kumagai paliĝis kaj montris fortan internan surprizon. Kontraŭe la alia virino heliĝis de ĝojo: ŝi certiĝis ke tiu ĉi ne estas la kapo de ŝia filo, kaj ŝi povis esperi, ke li estu ankoraŭ vivanta. Sed ekvidinte malĝojon de la alia, ŝi devis subkaŝi perforte sian senton.

Kompatinda estis la alia virino! La edzino de Kumagai tuj rekonis sian filon en tiu senkorpa kapo. Ŝi malforta virino venis ĉi-tien per longa, malfacila vojirado nur vidi feliĉan vizaĝon de sia amata fileto. Kaj kion ŝi vidas? Nur la kapon kun okuloj por ĉiam fermitaj!

Ho, kia bedaŭra devo! Sed ŝia edzo Kumagai agis noble kaj fidele, kaj ŝi, la edzino kaj patrino, devas ankaŭ tiel agi kiel vera samurai ĝis la fino, kaj tial ŝi devas subteni ŝian malĝojon kaj restadi kviete!

Sia filo estis knabo deksesjara, kaj volante mortis anstataŭ Atsumori, samaĝa. kaj tiel sin oferis pro la filo de la eksmastro de sia patro.

Si nenion eldiris, kaj staris en morta silenteco. Kvar koroj reciproke interparolis senparole—la armeestro, la sinjorino, la patro kaj la patrino. La plorĝemoj de l'gepatroj elfluigis silentajn larmojn al la armeestro kaj la sinjorino. Kaj la gepatroj estis postlasitaj kun la kesto antaŭ ili.—El japana historia dramo esperantigis J. Kimura por Japana Esperantisto.

NI NE TROGRANDIGU!

En nia Esperanta movado, kiel en ĉiu homa entrepreno, oni povas konstati tute malsimilajn labormetodojn variantajn laŭ la apartaj homoj kaj iliaj karakteroj.

Kiel por vivi la mondo bezonas ĉiuspecajn homojn, same tiu aŭ alia granda celado de la homaro bezonas por prosperi kunlaborantojn malsimilajn, dotitajn per kapabloj malsimilaj. Ju pli bone tiu ĉi kondiĉo estas plenumita, des pli bone kaj facile oni atingas la maksimuman sukceson.

Sed se ĉiuj kapabloj utilas, kiam ili estas racie kaj celkonscie uzataj, ĉiuj ankaŭ povas malutili, se oni aplikas ilin

En tiu ĉi rilato, unu tre danĝera kategorio da homoj estas la tro-optimistaj personoj, kiuj ĉion vidas per pligrandigantaj okulvitroj kaj parolas laŭ tio, kion ili mem kredas vidi.

Mi estas konvinkita, ke inter ili multaj, eble la plimulto, ne estas konsciaj mensoguloj, ili nur laŭnature emas kredi, ke iliaj deziroj estas realaĵoj kaj puŝitaj de ekscitita entuziasmo ili predikas tion, kion ili kredas vera. . . .

Oni ekzemple donas statistikojn kun ciferoj fantastikaj ĉerpitaj "en la aero." Oni parolas pri milionoj da Esperantistoj, pri miloj da societoj, centoj da ĵurnaloj. Oni trograndigas la facilecon de la lingvo, certigante, ke ĝi estas lernebla sen ia peno dum kelkaj tagoj. Oni promesas al la lernontoj tujan materialan profiton, tutmondan klientaron, rapidegan riĉiĝon, k. t. p. . . .

Cu la aŭtoroj de tiuj sensencaĵoj imagas. ke la redakcioj kaj la inteligenta publiko naive kredas ilin? La publiko povas lasi sin erarigi unu aŭ du fojojn, sed kiam ĝi rimarkas, ke ĝi estis trompata, ĝi fariĝas skeptika pri ĉiuj aliaj informoj rilate al la sama afero, kaj tiun malfavoran opinion oni nur tre malfacile detruas.

Kiom da saĝaj homoj oni fortimigis de utilaj entreprenoj per ĉarlatana fan-faronado! Ĉarlatanaĵoj sukcesas ĉe malsaĝuloj kaj allogas ilin, sed ni ne bezonas malsaĝulojn en nia movado, nur inteligentuloj povas fari servojn al ĝi,

povas ĝin progresigi; tiajn utilajn homojn ni devas altiri al ni. Bedaŭrinde, kiam tiaj homoj unue aŭdis la bruan voĉon de la ĉarlatanoj, ili preskaŭ certe estas perditaj por ni.

Ni tamen feliĉe povas konstati, ke la proporcio de mensogemaj propagandistoj estas malgranda en nia Esperanta movado. En sia granda ĝeneraleco, niaj Esperantaj propagandistoj diras la puran veron, parolas nur pri okazintaj faktoj. Sed unu sola arogantulo faras pli grandan bruon ol cent modestaj propagandantoj, kaj la amaso juĝas laŭ la pli laŭta kriado.

Cu ni do ne havas sufiĉan, sufiĉegan argumentaron por pruvi publike la bonegecon de la Esperanta afero kaj ĝian gravecon? Ni nur citu la faktojn sen ia pligrandigo nek aldono, ili jam sufiĉe elokvente parolas per si mem. Ciu pripensanta homo, kiu estos atentigata pri tiuj faktoj komprenos; oni nur devas klare prezenti al li la veron.

Cu ne mirinde estas, ke homoj de ĉiuj mondpartoj senescepte povas kun tia facileco interkompreni skribe kaj buŝe? Cu ne mirindaj estas en tiu rilato la rezultatoj de niaj kvin unuaj kongresoj? Ili malkovras fakton absolute novan en la historio de la homaro, fakton, kiu estas kvazaŭ miraklo kaj antaŭdiras tutan revolucion en la interpopolaj rilatoj de l'estonteco. Ni, Esperantistoj, jam kutimis al tiu speco da miraklo, kiun ni vidas de kelkaj jaroj, sed la granda publiko ne ankoraŭ klare komprenis ĝin nek ĝian signifon kaj ne ankoraŭ realigis al si la verecon de tiu belega progreso homara.

La publiko ne realigis, ke oni povas per Esperanto pritrakti ĉiujn eblajn temojn, eĉ la plej malfacilajn sciencajn demandojn, priparoli la plej komplikajn abstraktaĵojn kun facileco kaj klareco almenaŭ same grandaj kiel en naciaj lingvoj. Malmultaj scias, ke nia Esperanta biblioteko konsistas el pli ol mil libroj, inter kiuj oni trovas verkojn pri matematiko, leĝoscienco, teologio, fiziko, kemio, filozofio, psikologio, k. t. p. Oni ankoraŭ malmulton scias pri la efektiva vastigado de Esperanto en la tuta mondo, pri la ricevitaj oficialaj apogoj, pri la

oficiala instruado en multaj lernejoj, pri la aplikado de la lingvo al plej diversaj celoj, pri la Esperantaj institucioj kaj organizaĵoj en preskaŭ ĉiuj grandaj urboj, pri la multaj praktikaj servoj jam nun riceveblaj de Esperanto, k. t. p. . . .

En ĝojiga, promesplena progresado estas la Esperantismo; dum lasta jaro ĝi atingis neesperitajn sukcesojn. De la Esperanta popolo dependas, ke la progresado daŭru same kreskante, kaj por tio inteligenta kaj honesta propagando sufiĉas.—J. Borel en Germana Esperantisto.

"LA RADO TURNIGAS."

Revenante de sukcesplena milito, la egipta reĝo Sesostris kunkondukis multajn sklavojn kaj kvar militkaptitajn reĝojn. Alveninte al sia reĝa urbo, li ordonis, ke la kvar kaptitaj reĝoj tiru lian venkgloran veturilon. Unu el la kvar reĝoj, tirante la veturilon, senĉese turniĝis kaj rigardadis la veturilradojn. Sesostris demandis lin, kial li tion faras. La reĝo respondis:

"Kiam la rado turniĝas, la supra parto ĉiam malsupren moviĝas kaj la malsupra parto supren moviĝas. Tiamaniere ankaŭ varias la homa feliĉo; kiu hodiaŭ estas feliĉega, tiu jam morgaŭ povas fariĝi malfeliĉega. Sesostris miregigis pri tiuj vortoj kaj ordonis, ke la kvar militkaptitaj reĝoj tuj hejmenrevenu.—Malnovan egiptan legendon tradukis Alois Halamasek por Japana Esperantisto.

GARDSTARANTO.

En nokta ekzercado rotestro demandis rekrutojn, kion faros gardstaranto kiam iu venas transpasi la gardlinion. Unu rekruto nomita respondis: "Antaŭ ol enpermesi, elvokas kaj ekzamenas tiun personon." La rotestro tre kontenta: "Prave! nu, supozu, vi estas gardstaranto tie ĉi, kaj la malamiko estas antaŭ ni ĉe P." Kaj la rotestro kun ceteraj soldatoj iris malantaŭen kelkajn paŝojn kaj rigardas. Jen, iu alproksimiĝas al la gardstaranto. Videtante ĝin en mallumo, li tuj prenas sian pafilon kaj elvokas: "Halt'! Kiu estas?" "Patrolo del l'malamiko" respondis tiu suspektindulo. La

rekruto-gardstaranto dece sintenas kaj diras: "Bone, eniru!" Ciuj ekridegas. La rotestro ne ridas, sed riproĉas lin: "Kio? Vi enlasas patrolon de l'malamiko; Cu ne estas tre danĝere al ni?" Tiam la rekruto laŭte, serioze: "Ne timu, Sinjoro rotestro, li estas maljuna soldato N, kiun mi konas!"—Beko, en Japana Esperantisto.

AMIKECO.

Amikeco estas la alplenigo de fizika amo, de patra amo kaj la bazo de societemo. Tiu ĉi korinklino, duone ennaska kaj duone memvola, malebligas ke geedzeco, tiu dia amikeco, disligiĝu, kiel ĉe la bestoj, post la faro de idokrea kuniĝo, kaj ĝi estas la deveno de tiu vasta reto da societaj interrilatoj, kiuj jen formas nian feliĉon, jen nian malfeliĉon, kaj estas la plezuro aŭ turmento de nia tuta vivado. Kiam tiu ĉi sento estas subtila, nia korinklino estas pli ĝuste ekkono, ol amikeco.

Amo preskaŭ ĉiam estas kulto sen religio, sed amikeco preskaŭ ĉiam estas religio sen kulto. Tial amantoj estas pli idolservantoj, ol kredantoj, tiel kiel amikoj estas pli kredantoj, ol idolservantoj.

Amo volas la korpon kaj amikeco la animon. Tiu estas tute objekto kaj tiu ĉi estas tute subjekto.

Amikeco estas amo, kiu ne komunikiĝas per la sentoj.

Tiel fervora estas amo, ke ĝi preskaŭ ĉiam aspiras ke plensangeco ĝin mortigu, sed amikeco estas tiel senagiteca, ke ĝi preskaŭ ĉiam aspiras morti de maljuneco.

Amikeco estas mistikismo de amo. Se estus kreskaĵo nomita "amo," ĝia floro devus nomiĝi "amikeco."—El hispana lingvo tradukis Vicente Inglada por Gazeto Andaluzia.

Almozulo: Donu al mi 20 centimojn por la kvar miaj infanoj.

La Sinjoro: Ne estas granda sumo la 20 centimoj, sed mi ne intencas aĉeti pluajn, mi jam havas 5.

RONDO TRA LA SPACO.

Tra la spaco vojaĝas juna rondo rondiranta en sia agalimo; ĉirkaŭita de profundaj abismoj ĝi flugas rapide al la senfino, kiu antaŭ ĝia rigardo malkovriĝas, altirita de sia sorto kiun ĝi ne povas kompreni, admirante nur la belan kaj ĉarman vojon.

Subite haltas antaŭ ĝi malgranda atomo. La rondo faras geston de malplaĉo kaj ĝin forigas per forta blovo; apenaŭ denove ĝi soliĝas alia atomo dis-

tras ĝian atenton.

"Kiu vi estas?" demandas la rondo.

"Mi estas tiu kiu impresas ĉiujn viajn sentojn."

Per alia blovo la rondo forigas la atomon. Poste, una post la alia, la atomoj ne lasas trankvila la rondon.

"Kiu vi estas?" demandas la rondo al

nova atomo.

"Mi estas estaĵulo, punktulo, kiu tra la senfino faras eterne sian vojaĝon."

Malplaĉas tia respondo al ĝi kaj rapide forirante ĝi vidas ian helan punkton. Ju pli la punkto alproksimiĝas des pli ĝi grandiĝas. Tiel ĝi brilas ke la rondo preskaŭ ne povas konstraŭstari la influon de ĝia lumo.

De malproksime la rondo faras signaloin, ekkriante: "Atentu! atentu!" sed la luma punkto antaŭeniras rapide kaj tre grandiĝas kovrante la tutan spacon. Mirigita restas la rondo kaj ŝanceliĝante ĝi demandas: "kiu vi estas? kiu vi estas?" sed la grandega punkto pasante proksime al ĝi foriras rapide. Post momento nur restas malgranda punkto malproksime en la spaco; poste ĝi tute malaperas.

Nur tiam la rondo komprenis sian staton kaj sin kredante malfeliĉa malgaje daŭrigas sian vojon. Gi baldaŭ haltas kaj ĝian vojaĝon ne volas daŭrigi. Senkonscie ĝi enĵetiĝas al proksima profun-

daĵo.

Malsupre, malgrandaj genioj haltas antaŭ ĝi kaj surprizita ĝi ekdiras:

"Ho! ĉu pli da atomoj?"

"Nenion oni novas fari sen ni," respondis la malgrandaj genioj ĉirkaŭante la rondon.

"Kiu vi estas?"

"Mi estas ĉio kaj nenio; la komenco

kaj la fino de ĉio kaj ĝia fundamento. Mi estas la pozitiveco kaj la neeco; la eterna balanciĝo; la akvo, la tero, la vento kaj la fajro.

"Sed vi estas tiel malgranda ke apenaŭ

mi vidas vin!"

"Vi min ne konas kaj sciu ke vi neniam ekzistus sen mi. Ĉion kio altiras vian atenton vi suldas al mi.

Malestimante tiajn vortojn ripetis la

rondo:

"Sed vi estas tiel malgranda . . ., kion mi faros el vi?"

"Cio vi estante vi estas nenio," respondis la atomo.

Ĉiuj malgrandaj genioj ĉirkaŭas la rondon kaj dancas konfuzitaj dirante:

"Vi devas nutri kaj korpigi al ni por

nin vesti kaj senvestigi."

"Kion vi diras? ĉu mi devas nutri kaj korpigi vin? Kiu povas kredi tion? Neniu."

Gi rapide foriras, dirinte al si, "El malgrandaj genioj povas naski nenion

grandan."

Perdita en la senfina spaco vi marŝadas sencele sin kredante malbenita. "Nur mi plaĉas al malgrandaj atomoj! Ho! kial mi ne plaĉis al grandega lumo?"

Voĉo.—La analogio nur konstruas la

diversajn aferojn.

Rondo—Kiu parolas al mi?

V.—Via estas mia voĉo.

R.—Ho! Granda, belega estas la ekzisto! Kio signifas la diversaj aĵoj?

V.—Ho, mia kara! ĉiu reala aĵo estas ŝajna.

R.—Mi marŝas ne vidante mian vojon.

V.—Enfirmiĝu, kaj vi ĝin vidos.

R.—Ho, kara voĉo! Kion mi faros por tion scii?

V.—Demandu pri tio al la atomo! . .

R.-* * * * *!

ĥ—Andreo Vallverdu, en Holanda Pioniro.

LA VANTECO.

Kio estas vanteco?

Vanteco estas pasia amo al laŭdoj, akriĝinta memestimo. Memestimo, laŭ la nuna vortsignifo, estas deziro al laŭdo, deziro tre ĝenerala kaj tre normala. Van-

teco estas troiĝo kaj elvojiĝo de tiu ĉi deziro; vantulo estas tiu, kiu vivas, por fari efekton, por brili, por sin admirigi. Li estas tia sama, kiel avarulo, kiu amas monon pro mono kaj ne pro la efektivaj bonaĵoj, kies simbolo kaj fonto ĝi estas; li amas laŭdon pro laŭdo. Li estas avarulo de laŭdo.

Ni esploru la ĉefajn trajtojn de tiu homa tipo, kiun oni nomas vantulo. Ni notu ties karakteron, specojn, morojn.

Unue, per kio en la ordinara vivo oni lin ekkonas?

Vi lin ekkonos el la maniero mem, kiel li akceptas laŭdon: li ne povas ne ekradii ĝojon sub la kareso de l'gratulo. Se li penas sin deteni, vi lin trapenetras ankoraŭ pli bone; li ja tiam faras modestajn mienojn, kiuj al neniu trompas. Sed sin ne detenas vulgara vantulo: li "paradas"; li "pavumas." Kompreneble, kritikoj male efikas; vantulo de ili tuj mallumiĝas, akriĝas, kelkafoje konfuzegiĝas.

Vi lin ekkonos ankoraŭ el la pli malpli lerta artifikado, per kiu li penadas ricevi tiujn laŭdojn tiel bongustajn; per subtilaj ĉirkaŭvojoj alkonduki de tre malproksime la interparolon al favoraj temoj; direkti mem al ni gratulojn, por nin devigi al regratulado; mallaŭde paroli pri si mem, por nin devigi al protesto, kaj se ni eble ne protestas, tiam ekofendiĝi kaj elmontri malkontentecon—tiaj estas la plej ordinaraj ruzoj de l'vantulo.

Oni tamen ne kredu, ke li nepre estas fanfaronema.

Tia li estas kelkafoje: kiam ne alvenas la tiel deziritaj, tiel serĉitaj, tiel almoze sopiritaj laŭdoj; tiam li ja devas al si mem eklaŭdi. Sed vantulo iom inteligenta evitas sin allasi al tia ekstrema rimedo; li rimarkis, kaj tio ne postulas grandan sagacegecon,—ke malbona rimedo, por ricevi laŭdon, estas sin laŭdi mem unue; al li, kompreneble, tio ĉi akrege jukas, sed li tamen ne cedas; li scias, ke li pli bone sukcesos per lerte ŝajnigita modesteco. Fanfaronado estas do nur lasta rifuĝo de mallertaj kaj ne sukcesintaj vantuloj.

Ni nun ekzamenu kelkajn specimen-

ojn el tiu speco, la plej konatajn aŭ la plej kuriozajn.

Jen estas unue formo de vanteco tre ofta ĉe junuloj; formo, kiun oni nomas per vorto iom vulgara, sed ne anstataŭigebla: la pozo. Vi konas tiun spiritstaton: "pozanto" antaŭ ĉio volas ne forpasi nerimarkita; nu, por sukcesi en tio, al li ŝajnas plej taŭge, sin apartigi per strangaĵoj. Tiam li faras al si manieron de marŝado, de sinvestado, de parolado, de silentado, kiun li opinas taŭga, por frapi la rigardantojn. Plie, ĉar li nepre volas konvene ludi sian rolon, li sin mem observadas, neniam ĉesigas atenton pri sia sintenado, al si mem donadas gratulojn kaj aplaŭdojn. De tio devenas tiu afektemeco, tiuj rigidaj mienoj, tiu kutimo de sinaŭskultado, kiujn vi tiel ofte rimarkis. Ridindaĵo, sendube, sed ridindaĵo ofte negrava kaj tre maldaŭra ĉe tre junaj homoj; en tiu ĉi okazo ofte troviĝas mallertaj imitadoj vundita delikateco, noblaj aspiroj, kaj multe da timemeco.

Alia formo tre amuza,—amuza por observanto,—estas la vanteco de l' spritulo. Kiu ne scias, kiom multaj estas tiaj specialistoj? Tiajn homojn ni ĉie renkontas, por kiuj la ĉefa afero en la vivo estas trovi "spritaĵojn"; se ili foriras de vi, ne sukcesinte, tiam ili ĉagrenegiĝas kaj kontraŭ vi konservas ian obtuzan venĝemecon; se ili sukcesas, jen ili ĝojradias kaj montriĝas plenaj de korfavoreco. Pri tiuj homoj oni povas diri: ke ili estas tedaj, ke sufiĉe facile ili fariĝas malbonaj, sed ke ili estas feliĉaj. Tedaj. tio ĉi estas plej evidenta: ni ĝin spertas Malbonaj, sufice ofte; ĉiufoje kiam tio estas necesa, por brili. Feliĉaj, preskaŭ ĉiam: dank' al ia favora sorto la 'spritulo" ja neniam konscias la efekton, kiun li efektive faras; li ĉiam imagas al si, ke li postlasas sur sia vojo murmureton de admirado. Tre serioze, li apartenas al speco de homoj plej bone armitaj por feliĉo; li ja havas proksimume nur unu celon, kaj tiu ĉi celo estas facile trafebla: kiam por iu homo la supera idealo konsistas en tio, ke li en ĉiu interparolo trovu unu-du spritaĵojn, aŭ, pli simple, rediru denove malnovajn, kaj

kiam tiu ĉi homo estas specialisto en la fako, li devus esti forlasita de la dioj kaj homoj, se li ne sukcesus.

Tute proksime al tiu ĉi vanteco havus lokon la vanteco de la universala sciulo; ĝustadire ĝi estas pedanteco. Mi aludas tiujn tiel multajn homojn, kiuj ne preterlasas unu okazon "fari paroladon," elmeti sian scion, korekti niajn erarojn aŭ instrui nian nesciecon; tiujn homojn, kiuj kredus ne plenumi altan mision, se ili ne disdonus al la aŭskultanta homaro la manaon de sia parolo; tiujn homojn ankaŭ, kiuj superŝutas vin per grandaj vortoj kaj ambicie tehnikaj formuloj. Ĝi estas la raso de tiuj, kiuj "interligas ĉiujn vortsonojn," por montri, eĉ parolante, ke ili scias la ortografion.

Fine, ekzistas ia speco de vanteco, kiu estas, se tiel diri, ankoraŭ pli vanta; vanteco je la dua potenco. Ĝi estas tiu, kiu rilatas eĉ ne plu al frivolaj kvalitoj, sed nur al eksteraj signoj: honoroj, konatoj, ordenoj. Ni konsideru iomete tiun ĉi novan specon sufiĉe kuriozan.

La vanteco pri konatoj estas kvazaŭ la lasta glorigilo de l'vantuloj. Kiam ili fine komprenis, ke ili sendube ne atingos admiron per sia propra persono, ili tiam eksentas, ke al ili restas unu rimedo: satelite rondiradi ĉirkaŭ iu estaĵo, kiu al ili ŝajnas admirinda. Tiam oni aŭdas ilin diri kun ŝajne indiferenta tono: "Hieraŭ, ĝuste kiam mi estis parolanta kun X... (granda verkisto, granda artisto aŭ granda ministro)" aŭ same, "Antaŭ kelkaj tagoj, dum mia vespermanĝo ĉe lia moŝto la Markizo de . . ." Al tiu speco ankaŭ apartenas tiuj homoj, kiel sprite rimarkigas La Bruyere, kiuj tre rimarkeble vin salutas, kiam ili troviĝas en akompano kun grava persono; kiuj sin ĵetas el la pordeto, por vin ne maltrafi, t. e. por ne maltrafi la okazon, esti vidata "en sama fundo (de veturilo) kun iu eminentulo.'

La vanteco pri ordenoj, rubandoj, galonoj, palmobranĉoj, ĉiaspecaj uniformoj, estas ankaŭ tre interesa por psikologo. Sendube, ni ĉiuj scias, kiel modeste, aŭ, pli ĝuste, kun kia absoluta simpleco oni povas porti ordenon. Sed,

por vantulo, kia bela elpensaĵo! Ni ĝin komprenu en ĝia plena beleco. Vantulo vivas, por esti admirata; vivas por efekto; vivas por laŭdo; terure li deziras gratuli al si mem, sin mem laŭdegi; sed, kiel ajn akre li tion deziras, li ne kura-ĝas; nu, ĉiaspecaj ordenoj estas mirinde lerta rimedo, por solvi tiun ĉi problemon: senvorte sin laŭdi. Vantulo, kiu promenas kun ia rubando ĉe la butontruo, sin laŭdas senhalte, sin laŭdas antaŭ ĉiuj pasantoj, kaj sin laŭdas, eĉ ne bezonante malfermi la buŝon.

* * *

Ni nenion trograndigu, kaj la vantecon ni ne konsideru "tragedie." Ĝi ja pli estas karaktera manketo, ridinda trajto, ol efektiva malvirto. Ekzistas vantuloj, kiuj estas tre bonaj homoj. Eĉ ekzistas, kvankam pli malofte, tre altvaloraj homoj, kiuj estas vantaj. Precipe ĉe tre junaj homoj vanteco, kompreneble, ĉiam malplaĉa, ne ĉiam estas tre timinda; tiuj, kiuj estas inteligentaj, baldaŭ resaniĝas kaj povas atingi veran simplecon.

Do, ĝi ne estas malvirto. Sed ĝi certe estas malforteco kaj kaŭzo al morala malvaloriĝo. Unue malforteco: vantulon oni ja baldaŭ ekkonas el liaj artifiketoj, el liaj ruzoj pli malpli subtilaj, el liaj subitaj ekkoleroj aŭ raviĝoj. Kaj tiam li estas viktimo, elmetita al ĉiuj, kiuj scias lin flati. Ekzistas viroj, ankaŭ virinoj, de kiuj oni povas ĉion ajn ricevi, se nur oni lerte karesas ilian vantecon. Krom tio, vantulo estas, ne ĉiam, sed tre ofte, timemulo. Timemulo estas tiu, kiu treege deziras favore opiniigi pri si mem kaj kiu samtempe antaŭsentas ian malkapablecon; antaŭtimas ian mallertecon, ian malfacilecon; anstaŭtimas, ke li ne aperos tia, kia li dezirus aperi; antaŭsuferas pro tio, ke li eble ellasos ian bedaŭrindan malspritaĵon: unuvorte, vanteco superekscitita kaj malkvieta.

Ne malpli granda estas la morala danĝero. Jen estas la kaŭzo: kiu pasie amas laŭdon, kiu vivas por efekto, kiu vivas "por la rigardantoj," se tiu ne estas cetere armita per tre fortika moraleco, li fine venos al plej gravaj malnoblaĵoj. En ia situacio de la vivo, anstataŭ sin demandi la sole demandindan aferon: "Kio estas justa?" li sin demandos: "Per kio mi plej brilos?" El tio vi komprenas la disfalon de ĉia moraleco. Nur unu ekzemplon mi citos: la ekzemplon de Tre kredeble, vantulo faril'mensogo. ĝos mensogisto. Ciufoje kiam li ludis senbrilan rolon, li estas tentata mensogi: li inklinas plibeligi ĉiujn scenojn, en kiuj li partoprenis, por kaŝi siajn malfortaĵojn, siajn mallertaĵojn aŭ erarojn. Memoru pri la tiel multnombra raso de la "trograndigistoj," de tiuj homoj, kiuj ĉion multobligas: tempon, interspacojn, nombrojn; ili preskaŭ ĉiam estas vantuloj; ili komencas rakonton; ili rimarkas, ke la aŭdantaro restas malvarma; la efekton ili riskas maltrafi: ili tiam pligrandigas kaj ankoraŭ pligrandigas, ĝis kiam ili fine frapas la spiritojn, aŭ almenaŭ tion kredas. Krom tio, pli grave, en vanteco estas principo de maljusteco. Kiu pasie deziras brili, tiu facile oferos la ceterajn por sia propra sukceso. Vantulo superekscitita ofte estas senkompata por tiuj, kiuj lin malhelpas ek-brili; senkompata por tiuj, kiuj pli brilas, ol li; senkompata por tiuj, kiuj ne sufiĉe lin admiras.

Vantuloj ĉiam estas homoj, kiuj malmulte aŭ malĝuste pripensas. Plej malgranda saĝo ja sufiĉas, por diri al si: kian ajn oficon mi plenumas, kiajn ajn bonaĵojn mi ĝuas, neniam pri tio estas tre fanfaroninde, ĉar tion mi dankas al multaj cirkonstancoj, kiuj kunlaboris kun mi.

Fine, estas bone memori, ke ĉiuj tiuj bonaĵoj, pri kiuj ni vantas: spriteco, beleco, riĉeco, k. t. p., efektive nenion valoras per si mem. Ĉio ja dependas de tio, kiamaniere oni ili uzadas. Riĉecon oni povas uzadi ridinde; belecon oni povas uzadi hontinde; inteligentecon oni povas uzadi por krimaj faroj. Se ĉiujn nomitajn ecojn oni uzados por la bono, nu, laŭdinde! Tiam oni rajtos eksenti fierecon, kiun neniu jam nomos vanteco. Sendube nur pri jeno en la mondo oni neniam povas vanti: pri boneco kaj justeco.

El franca originalo laŭ Prof. Melinand tradukis R. Le Joyant por Lingvo Internacia.

EL LA HISTORIO DE L'SKRIBO.

Ciujn akiraĵojn de nuna nia kulturo atingis la homaro ne momente, sed per la vojo de longega evolucio, kies komencoj estas al ni, hodiaŭuloj, pligrandaparte nekonataj. En malkvietega vivtumulto de hodiaŭaj tagoj ŝajnas al ni tiuj akiraĵoj jam tiel nerimarkindaj, ke eĉ ne venas al ni l'ideo pripensi tion, kion ili por la mondo signifas; ili aperas al ni kiel io evidenta; eĉ tamen ekzistis iam tempoj, kiam ili ne estis kaj estis necese fondi iliajn komencojn. Sur donita fundamento konstruadis poste longega evolucio kaj la rezultato de tiu ĉi evolucio kunkreskis kun la homaro tiel fortike, ke ni rekomprenas nune, ke eĉ sen ĝi la homo povis tiam esti ankaŭ "homo."

Elsercadi postesignojn de tiu ĉi interesplena evolucio estas studadi la homaron: tamen ĝis nun oni dediĉas en lernejoj malmulte da tempo al tiu ĉi ŝatinda objekto de la homa esplorado-al kultura historio. Diru ekzemple, kion vi aŭdis el buŝo de viaj instruistoj pri la evolucio de la skribo? Nenion aŭ preskaŭ nenion! Eĉ tamen estas nedisputebla, ke unu el la plej gravaj akiraĵoj de nia vivado estas la skribo, kiu per tio mem, ke ĝi evolucion komencis, donis fruktodonan iniciaton al naskiĝo de aliaj novaj fakoj. Ni vidu jenan interligon: skribo, papero, libro, literaturo, fiksiĝo kaj komunikiĝo de sciencaj ekkonoj per libro, presado, gazetaro, poŝta instituto, stenografio. k. t. p., k. t. p. Ne estas neutila sciiĝi ion pri historio de la skribo.

La skribo en larĝa vortsenco estas aro da kiaj ajn (videblaj, aŭdeblaj, palpeblaj) signoj, per kiuj oni komunikas pensojn aliamaniere of lingve; en mallarĝa kaj propra vortsenco ĝi estas aro da nealiformigeblaj kaj neŝanĝeblaj signoj, per kiuj esprimatajn pensojn oni antaŭmetas al okuloj. Tio estas do komuna eĉ al la skribo, eĉ al la lingvo, ke ili ambaŭ taŭgas esti pensesprimiloj; sed la skribo havas kontraŭ la lingvo unu gravegan preferon: la penso elparolita jam kun sono samtempe mortas, sed la penso skribita postevivas generaciojn kaj venkas eĉ la plej grandan spacon, kaj en tio kuŝas la signifo de la skribo.

Certa estas, ke en malproksimegaj antaŭhistoriaj epokoj nur lingve interŝanĝadis la terloĝantoj la pensojn inter si. Buŝa tradicio estis do la sola ilo per kies helpo oni konservis memoron de famaj personoj, iliaj gloraj faroj kaj gravaj okazintaĵoj. Sed ne estas necese supozi longan sperton, por ke oni ekkonu, ke la buŝa tradicio ne havas taŭgecon, kaj tial estas bezono de alia pli fidinda komunikilo.

La eksento de tiu bezono donis fondon al la komenco de la skribado. Kiam kaj kie la plej unua skribo prenis originon kaj kian formon tiu ĉi origina skribo havis, estas neordinare primitiva. povus citi kelke da lokoj el nemortemaj Homeraj verkoj aŭ el Malnova Testamento, kiuj bone montras al ni tion, kio anstataŭis la buŝan tradicion: alrulita ŝtono, enplantita arbo, farita amaso da ŝtonoj estis tiam monumentoj de memorindaj okazintaĵoj. La homo engravuris diversajn signojn en arbŝelon, ŝtonon, sur bastonojn kaj aliajn objektojn por eksigni propraĵrajton, ŝuldojn, k. t. p. Strange originalan "skribon" eltrovis Inkoj en Peru, kiuj kreis tiel nomatan nodskribon. Sur ĉefŝnuron ili pendigis ŝnuretojn kun nodoj; per koloro kaj spaco inter faritaj nodoj la pensoj estis esprimataj. Simile ankaŭ la Indianoj en Nordameriko kolorigis markonkojn kaj traborinte ilin trairigis rimenetojn, kiujn ili portadis por rememoro de faritaj kon-Ankaŭ hodiaŭ oni portadas traktoj. memormedaletojn kaj oni faris poŝtuknodojn por rememoro.

Sed tio ne daŭris longe kaj la homo komencis deziregi ian pli klaran pensesprimilon; li desegnis do sur ŝtono, ostoj, ligno, pli poste sur ledoj kaj arbfolioj, bildetojn de apartaj objektoj, kiuj okupadis tiam lian pripensadon. naskiĝis la bilda aŭ ilustraĵa skribo. sia rebusa skribmaniero apartenas indiana tatuado, figuraĵa skribo de Meji kaj Aztekoj kaj bildetaj skribaĵoj de preskaŭ ĉiuj ceteraj nacioj. Komprenebla estas, ke ĉi tiuj ilustraĵetoj estis simplaj, tre malmulte belformaj, similaj al unuaj desegnaĵoj de hodiaŭaj infanoj. La skribo estis kunligita senpere kun la penso mem, ne kun lingvo de la skribanto, kaj

tial ĉiu povis ĝin legi eĉ nekonante la lingvon; estas do direbla, ke la skribo tiam estis kiel internacia. La homaro elkreskinta el infanjaroj pligrandigis sian pensfakon per komprenaĵojn bilde neskizeblaj, por kiuj estis necese akceptadi ankaŭ certajn figuraĵojn, simbolojn.

La longa uzado kaj penado plirapidigi la skribadon, forĵetinte ĉiujn superfluaĵojn postlasis sole karakterizajn ĉeftrajton de diritaj ilustraĵetoj. Tiamaniere precipe ĉe Ĥinoj, kiuj praepoke estis uzantaj la nodskribon kaj poste havis bildskribon, progresis l'evolucio. bildskribo perdis per tempoj sian bildan karakteron per tio, ke la ilustraĵetoj plisimpliĝis kaj tiaj plisimpligitaĵoj estis kunigitaj. Per tiu ĉi kunmetado kreiĝis specialaj signoj por ĉiu objekto kaj ĉiu komprenaĵo—aŭ alie—por ĉiu vorto; tial hina skribo nomiĝas vortskribo. Ĥinoj restis sur tiu ĉi evolucia grado ĝis nun. Hinoj, simile kiel Japanoj, skribas en vertikalaj linioj de supro malsupren irante de maldekstra mano al la dekstra.

Gravan antaŭenpaŝon faris Egiptanoj; ili ne nur plisimpligis (hierata kaj demosa skribo) sian antaŭan bildskribon (hieroglifa skribo), sed ankaŭ ili unuaj alvenis al ideo skribe eksigni ne objektojn, sed la sonon de vorto. Ili esprimadis per simpligita bildeto sole unu silabon, t. e., unuan silabon de la vorto, biun ili havis por la desegnita objekto; tiom da bildetoj estis do necesaj, kiom da silaboj havis la vorto. Sed tiu ĉi skribo atentis nur konsonantojn, ne vokalojn. La Egiptanoj ankaŭ poste uzadis multe-precipe sur tombaj monumentoj -ankoraŭ plenan bildskribon. kojnforma skribo de Mezopotamianoj estis parte jam sonskribo.

Veran sonskribon ekkreis en Xa jarcento a. k. Fenikianoj eltrovinte alfabeton de 22 signoj, per kiuj estis esprimeblaj ĉiuj vortsonoj de sia lingvo. Fenika sonskribo estas nomebla "silaba skribo," sed nur entiu senco, ke ĝi esprimadis ankaŭ nur konsonantojn sen vokaloj, kio estas ĝis nun karakterizo de lingvo semidaj. Tial la fenika alfabeto estis akceptita de ceteraj semidaj nacioi kun pli grandaj aŭ plimalgrandaj ŝanĝoj kaj tiel ĝi fariĝis patrino de l'alfabetoj de

Hebreoj, Araboj, Sirianoj kaj de multaj aliaj aziaj nacioj; eble ankaŭ sanskrita alfabeto "devanagari" devenas de la fenika.

Kiel longe la disvastiĝado de la fenika alfabeto iris en direkto al Oriento, tiel longe la skribmaniero konservadis sian antaŭan karakteron esprimante nur konsonantojn, sed vokalojn aŭ ne atentante aŭ ilin aldonante nur en formo de punktoj kaj komoj. Sed la supredirita alfabeto jam en IXa jarcento antaŭ K. komencis disvastiĝadi ankaŭ al Okcidento kaj tie ĉi la skribo perdis la cititan karakterizon.

La Grekoj akceptinte kaj adaptinte la fenikan alfabeton komencis dediĉi egalan atenton al vokaloj kiel al konsonantoj, per kio ili fariĝis unua nacio, kies skribo signadis ĉion, kion oni elparoladis. El Greklando tiu ĉi skribo estis transportata en Italujon, de kie—kompreneble kun necesaj ŝanĝoj—la kristana movado alportis ĝin en tutan Eŭropon; ĉiuj romanaj nacioj akceptis nature tiun ĉi taŭgigitan alfabeton, ĉar ĝi havis plenan taŭgecon laŭsone esprimi pensojn eldiritajn en siaj lingvoj, sed la slavaj kaj germanaj nacioj almetinte pluajn ŝanĝojn, aldonis signojn por siaj propraj nacilingvaj sonoj.

La priskribo de l'evolucio de la skribo ĝis nun egale kiel la priskribo de tiu ĉi evolucio ĉe apartaj nacioj-estas nepensebla sen detalaĵoj kaj ne povas do esti objekto de mallonĝa gazeta artikolo, ĉar ampleksa faka literaturo nur malfacile pritraktas ĉi tiun objekton; sed unu tamen estas necese aldoni. Ankoraŭ Fenikianoj skribadis en linioj horizontalaj de dekstra mano al la maldekstra, sed pli poste estas jam videbla skribi unuan linion de dekstra mano al la maldekstra, la duan de la maldekstra al la dekstra kaj tiel senĉese, simile kiel la pluganto sur kampo; nuna nia maniero, skribi de maldekstra mano al la dekstra estas la plej juna kaj ĝi restis kiel la plej taŭga kaj oportuna.

- "Esperanto."

LI RICEVIS KOKINON.

Unu junulo, pripensinte la geedzecon, demandis la patron: "Kiu devus regi la geedzujon? Ĉu la edzo, ĉu la edzino?"

La patro respondis: "Aŭskultu la konsilon de via patro. Apud la ĉevalejo staras ŝarĝveturilo. Surŝarĝu kokinujon enhavantan sepdek sep da maljunaj kokinoj, jungu la ĉevalduon kaj forveturu tra la landon. Ĉe ĉiu domo kie sin trovas geedzoj, demandu kiu regas la geedzujon. Kiam vi estas eltrovinta edzinon, kiu regas la geedzujon, donu al la edzo kokinon. Kiam vi estas eltrovinta edzon, kiu regas la geedzujon, donu al li ĉevalon."

Laŭ la konsilo, de la patro, kiu estis vere saĝulo, la junulo jungis la ĉevalduon al la ŝarĝveturilo, surŝarĝis kokinujon, enhavantan sepdek sep da maljunaj koninoj kaj forveturis, de la patro domo, tra la lando.

Post longa veturado, ĝis tiam, kiam sin trovis en la kokinujo, nur sep el la sepdek sep kokinoj, sed restis ankoraŭ la ĉevaloj, la junulo fine atlngis unu domon, kie vivis, kun la edzino, unu edzo. Al la kutima demando, la edzo fiere respondis: "Mi regas ĉi tiun geedzujon kaj mi povas ĝin provi pervorte, el la buŝo de mia edzino." La fiera edzo alvokis la edzinon, ke ŝi tuje venu. Alveninte kaj sciigite la aferon, ŝi tuj jesis la diron de ŝia edzo, ke li vere regas la geedzujon. La naiva junulo diris: "Nu bone, elektu unu el miaj ĉevaloj."

Cirkonstance unu el la ĉevaloj estis blanka kaj la alia nigra. La edzo tuj elektis la nigran ĉevalon, sed la edzino vokis lin flanken kaj ili mallaŭte diskutis, unu kun la alia. Post momente la edzo reiris al la junulo kaj diris: "Mi decidis elekti la blankan ĉevalon." "Ja ne!" respondis la junulo, "vi ricevos kokinon."

El la angla tradukis J. E. Crary.

En Leipzigo, la "granda marurbo," ekzistis antaŭ tridekjaroj proksima al la foirejo magazeno je galanteriaj komercaĵoj, en kies montra fenestro troviĝis unu tagon du tabuletoj kun la surskriboj: "On parle francais" kaj "English spoken." Sed ĉar la posedanto estis konata malklerulo, oni moke demandis lin: "Nu, kiu paroladas do tie ĉi france kai angle?" Post kio trankvile venis la respondo: "Plej ofte la fremduloj."

SENDANKECO.

Antaŭ multe da centjaroj, vivadis feliĉa gento en belega lando, lavita de la maro kaj plena je ĉiuj bonaĵoj. La tero estis neordinare fruktoporta, kaj donis al ili ĉion, kion oni povus deziri. Malgraŭ la sovaĝeco de la epoko, ili vivadis pace kaj sendanĝere, kaj ne devis timi la alarmojn, kiuj ĉagrenis aliajn gentojn. Dum multaj jaroj, ili vivadis tiel ĝoje kaj trankvile; kaj ŝajnis, ke ili povus tiel vivadi por ciam.

Nu, oni ja scias, ke nenio povus okazi sen kaŭzo. Efektive, dum epoko, kiam nur per konstanta batalado oni povus daŭrigi la vivon, rimarkinda okazintaĵo gardis kaj fortigis tiun favoritan genton. Oni rakontas, ke la unuaj koloniistoj, elmigrante el malpli bonaj ĉirkauaĵoj, kaj alvenante al tiu nova lando, estis bone akceptataj de anaro de amikemaj gigan-Tiuj ĉi malmulte zorgis pri si mem, sed aparte ĝuadis la uzadon de sia grandega forto pro siaj novaj amikoj. ili fervore provis gardi la landlimon kontraŭ la kruelegajn gentojn, kiuj atendis la oportunecon por invadi tiun ĉi pacan landon. Tiamaniere, ili ebligis la koloniistojn konstrui siajn domojn, prilabori la kampojn, kaj krei la instituciojn de bonorda socio, ne timante la sovaĝan malamikon. Plie, ili tiel uzadis siajn fortojn, kiel plenumi la plej gravajn bezonojn de siaj amikoj, liverante la materialojn por iliaj domoj kune kun multaj el la plej dezirindaj objektoj por ĝojigi la Ili ankaŭ multege zorgis pri la kampoj kaj la ĝardenoj, senĉese akvumante kaj fruktigante ilin. Cetere, ili lerte plibeligis la tutan landon, kaj bele rebonigis la lokojn difektitajn de tertremoj aŭ de aliaj katastrofoj. Per malmultaj vortoj, pri preskaŭ ĉiuj aferoj ili senintermanke helpis la loĝantojn en tiu Dume, ili ne postulis grandajn rekompencojn pro siaj grandegaj laboroj. Se ili nur ricevus sufice da manĝaĵo por subteni siajn fortojn, kaj sufiĉe da spaco por vivadi kaj kreskadi, ili estus tute kontentaj.

Oni povas facile kompreni kiamaniere

la grandega helpo de tiuj ĉi senlacaj amikoj donus al tiu ĉi gento mirindan superecon kontraŭ la aliaj gentoj. Tiel favoritaj, ili kompreneble devus marŝi rapidege sur la vojo al civilizacio, kaj fariĝi glorega popolo. Cu oni povus kredi, ke tiel feliĉa gento detruus mem la fundamenton de sia propra bonstato, kaj tiel okazigus sian detruadon? povas esti, ke longedaŭra libereco el danĝeroj naskigus frenezan egoismon kaj senrezonan kredemon, ke ili estas la favoritoj de la dioj, kaj ke ili restos por ĉiam prosperaj kaj feliĉaj, spite la plej grandaj sensencaĵoj kaj krimoj? Kvankam oni apenaŭ kredus, ke tiuj homoj malsaĝege forĵetus sian propran feliĉon, estas vere, ke la renversiĝo de la gento tariĝis, ne per tertremoj, superakvegoj, pesto aŭ malsatego, sed per la preskaŭ nekredebla sendankeco de la popolo rilate al siaj plej bonaj amikoj. Iom post iom, la gento fariĝas tromemfida, ricevis la donacojn de siaj helpantoj kiel tributon, kaj postuladis nefareblajn laboroin. Efektive, ili devigis la helpantojn porti pli pezajn sarĝojn, kaj samtempe ne volis doni al ili la necesan nutraĵon. Fine, ili ne provis sufiĉe protekti eĉ la vivon de siaj noblaj amikoj kontraŭ la plej malbonaj anoj de la gento.

Oni povas facile diveni la finon. troa laborado kaj la nesufiĉa nutrado rapide detruis la fortojn de la antaŭe glora giganta anaro. Senĉese malfortiĝante, ili rapide cedis al malsano, kaj pereis. Dum la nombro de la gigantoj malpligrandiĝis, la gentanoj mem devis porti la pezajn sarĝojn, kiujn siaj amikoj tiel longe kaj gaje portadis. malgranda forto ne povis plene anstataŭigi la grandegajn muskolojn de la estintaj helpantoj, ili baldaŭ akceptis pli malaltan normon pri sia vivado. La domoj ne entenis tiajn bonajn meblojn; kaj la konstruaĵoj mem fariĝis malpli bonaj, kaj rapide difektiĝis. Ĉar la tero daŭris perdi sian fruktoportecon, oni trovis malpli riĉajn rikoltojn. La batalado pro vivo fariĝis pli kaj pli terura; kaj la antaŭa kontenteco cedis al malĝojo kaj malfeliĉo. Fine, la atentemaj malamikoj vidis la

oportunecon por invadi la sengarditan landon. Kurante trans la landlimon kun sennombraj militistoj, ili detruis la domojn kaj la ĝardenojn, kaj mortigis la loĝantojn. La malmultaj postvivantoj devis forkuri for de la pacaj hejmoj en arbarojn kaj kavernojn, kaj tie mizere atendi la morton. Mallonge, hodiaŭ restas nur senfrukta dezerto, por montri la vastan landon de antaŭe granda kaj feliĉa

popolo.

Tiel oni rakontas la legendon; sed ĉu iu povas ĝin kredi? Ĉu ne estus absurde. diri ke iu ajn popolo povus esti tiel malsprita kaj tute senigita je prudento, kiel montri tian nekredindan sendankecon kontraŭ la sindonemaj amikoj, kiuj faris ilin grandaj kaj feliĉaj, iliaj gardantoj kaj senlacaj helpantoj? Mi tute ne miras, se vi dubegas pri la fabelo; ĉar mi ankaŭ tiun saman farus, se mi ne rimarkus ion similan dum nia propra epoko, kaj en nia propra lando. kiuj unue elmigris el Eŭropo en la nunan Usonon, ricevis bonvenon de mira giganta amikaro, kiuj tiam loĝis en la lando, de la Nordo al la Sudo, kaj de la Oriento al la Okcidento. Tiuj ĉi amikoj volonte sin prezentis, por estis gardantoi kontraŭ la superakvegoj kaj la uraganoj, kiuj estas tiel sovaĝaj malamikoj kiel la furiozaj militisoj, kiuj minacis la domojn de la antikva gento. Ili konservis la riĉecon le la tero, kaj eĉ ĝin multege pligrandigis per siaj daŭraj donacoj. donis la materialon por la domoj de niaj patroj, kaj por ilia meblaro. El ili ja venis la ebleco subteni multajn el niaj pli gravaj industrioj, kaj progresadi pri elpensado kaj pri arto. Kaj kiuj, pli ol ili, pligrandigis la belecon de la naturo, kaj kaŝis la difektaĵojn faritajn de la antaŭaj katastrofoj? Kion, efektive, ni ne ŝuldas al tiuj ĉi gigantaj amikoj—la gloraj praarbaroj de Ameriko?

Nu, kiel ni pagis ilin? Oni trovas la hontindan rakonton sur ĉiu folio de nia nacia historio. Nia tuta sintenado pri la arbaroj, kiuj estas nia plej granda fonto ne nacia riĉeco, montras emon al sensenca malŝparemo kaj senpripensa detruado; kaj nun ni povas apenaŭ eviti la

konsekvencojn de nia propra frenezo kaj malvirteco. Estas certe, ke nur grandega vekiĝo tra la tuta lando povas savi nin de la punado kiu detruis la antikvan genton. La usona popolo ne havas pli gravan problemon ol tiu, kiu koncernas la konservadon de niaj restantaj riĉaĵoj. Grandega malutilo jam fariĝis; sed tuja reformo kaj saĝaj konsiloj povas nin savi de la plej malbonaj rezultoj. Dum tia gravega krizo, estus preskaŭ malvirta frenezeco, se oni aŭskultus al egoista avideco, aŭ permesus al lokaj ĵaluzoj aŭ persona ofendsento malhelpi la aferon de nacia progresado. La malamikoj de reformado ĉiam rapidegas, por semi malpacaĵojn inter ĝiaj amikoj, kaj por laŭte kriegi pro ia malgrava eraro de kelka ĉefreformulo, esperante, ke ili tiel povu detrui lian tutan laboradon. Ni ne estu trompataj de tiuj ĉi ruzaĵoj. Se ni meritas esti savitaj, ni energie daŭrigos la laboradon tiel glore komencitan de Gifford Pinchot, al kies nomo la posteuloj donos la honoron kiun oni hodiaŭ maljuste rifuzas; kaj ni ne ĉesos, ĝis ni kiel eble plej multe pagos la ŝuldon senmezuran al la arbaroj de nia lando, kaj ĝis ni sufiĉe zorgos pri ilia ĉiama konservado.

-JAMES F. MORTON, Jr.

LA MIRINDA PULO.

Unu cimologisto havis tre kuriozan pulon, tiel lertiĝa ke ĝi povis plenumi kelkajn lertaĵojn. La profesoro ŝatis montri la mirindan estaĵon al siaj amikoj.

Foje ĉeestante kunvenon kie sin trovis geeminentularo el la najbaraĵo, la mastrino petis ke li bonvolu montru al ŝiaj

gastoj, "la mirindan etan pulon."

Tre zorgeme, la profesoro prenis, el ĝia skatoleto, la pulon kaj metis ĝin sur tableto. "La pulo estas tre saĝa estaĵo," diris la profesoro, "kaj la nomo de mia pulo estas Bonaparto. Ĝi komprenas ĉion kion mi diras al li. Ĉu ne vere, Bonaparto?" kaj la pulo tuj jesis per lerta kapsigno. Metinte fingran pinton apud la pulo la profesoro ordonis: "Nu Bonaparto, saltu transen la mian fingron.' La pulo tuje kaj lerte saltis, kiel

ordonita. "Bone. Nun, resaltu," kaj la pulo resaltis. Metinte kune la pintojn de la dika kaj la unua fingroj antaŭ la pulo, li ordonis: "Trasaltu, Bonaparto," kaj Bonaparto trasaltis. "Nu, reen," kaj la pulo obeeme trasaltis reen. "Bone plenumita. Nun, venu Bonaparto." La pulo saltis al la mano de la profesoro kaj estis metita en ĝia skatoleto.

Staranta apude estis unu fiera kaj ĝentila sinjorino kiu petis: "Ho, kara profesoro, ĉu la kareta estaĵeto aktus por mi?" "Ho jes, via Sinjorina moŝto, jes vere. Mia Bonaparto estas tre kompleza pulo." Kaj, remetante la pulon sur la tableton, la profesoro diris: "Nun, or-donu al ĝi." La fiera virino metis pinton de beleta ruĝeta fingreto sur la tableto apud la pulo kaj sufoketeme kaj timeme diris: "Nu, venu, kara Bonaparteto," kaj obeeme la pulo saltis al la sinjorino. Si ekkriegis kaj tio timigis la pulon, kiu tuj enkuris en la vestaĵojn de la Sinjor-Sekvis kriego post kriego, ŝi frapadis per la manoj kaj kriegis ĝis ŝi preskaŭ svenis. Post multe da penado oni kaptis kaj metis pulon sur la tableto. Retrankviliĝinte la virino, spasme spirante, diris: "Ho, kara profesoro, vi aktigu ĝin."

La profesoro metis sian fingron sur la tableton apud la pulo kaj diris: "Bonaparto, saltu transen la mian fingron," sed la pulo ne saltis. Mirigate la profesoro rediris: "Mi ordonas al vi, Bonaparto, saltu transen la mian fingron," sed la pulo ankoraŭ ne movemis. La profesoro zorge purigis siajn okulvitrojn kaj metinte ĝin sur la nazo, atente ekzamenis la malobeeman pulon. Ĉio estis silentega en la ĉambro. Sin turnante al la fiera sinjorino, la profesoro diris: "Min pardonu, via sinjorina moŝto, sed tiu ĉi ne estas la mia pulo."

Esperantiĝis J. E. Crary.

"TRI KAJ UNU FARAS UNU."

(From the collected works of Ambrose Bierce, Neale Publishing Co., published in tenvolumes).

En la jaro 1861 Barr Lassiter, dudek-

du jara, loĝis kun siaj gepatroj kaj fratino apud urbo Carthage, usona ŝtato Tennessee. La familio ne estis riĉa, kaj dependis por sia subtenado je malgranda plantejo. Kiam la interna milito en Usono okazis, estis en la familio Lassiter, kiel en multaj aliaj familioj en tiu ŝtato, diversaj opinioj pri la ribelado. Lassiter estis fidela al la "Union" kaj la aliaj geanoj de lia familio estis tute kontraŭaj al la "Union." Tiu ĉi malfeliĉa disiĝo naskis netolereblan familian malagrablecon, kaj kiam la ofendanta filo kaj frato foriris el sia hejmo kun la ĵurinta intenco varbiĝi en la Federa Armeo de la Nordo, ne unu mano en lian estis metata, ne unu agrabla adiaŭvorto al li estis parolata, ne unu bondeziro kun li eniris en la mondon. Vojirante al Nashville, jam okupata de la Armeo de la Nordo, li kuniĝis kun la rajdista regimento de la ŝtato Kentucky.

Du jarojn poste, lia regimento trapasis la regionon el kie li estis veninta. Tiu regiono estis multe suferinta pro la detruado de bataloj, kaj sanga batalo estis okazinta apud la Lassiter'a familia domo. Sed pri tio la juna soldato sciis nenion. Trovante sin apud sia hejmo, li sentis fortan deziron vidi siajn gepatrojn kaj fratinon, esperante, ke ĉe ili kiel ĉe li la nenaturaj malamikecoj de tiu periodo estis forgesigitaj per tempo kaj forestado. Ricevinte permeson, li ekiris piede dum somera posttagmezo, kaj ne longe post la leviĝo de la plena luno estis promenanta sur vojeto antaŭ la domo en kiu li naskiĝis.

Soldatoj dum milito maljuniĝas rapide, kaj en juneco du jaroj estas longa tempo. Barr Lassiter sentis kiel maljuna viro, kaj estis pensinta trovi domon ruinigita kaj forlasita. Nenio, tamen, estis ŝanĝinta, kaj je la vido de ĉiu objekto li profunde estis kortuŝita. Lia koro sonis aŭdeble. Senkonscie li rapidigis siajn paŝojn ĝis li preskaŭ kuris.

La domo estis malluma, la pordo malfermita. Dum Barr Lassiter paŭzis trankviligi sin, lia patro eliris kaj staris kun nuda kapo en lumo de la luno.

"Patro!" ekkriis la juna viro, ekirante al li kun mano etendata, "Patro!"

La pli maljuna viro lian vizaĝon severe rigardadis, staris senmove dum minuto, kaj senvorte reeniris la domon.

Malkontentigita, humiligita, kaj malfortigita la soldato sidiĝis, subtenante sian kapon per mano tremanta. Li estis tro bona soldato akcepti malvenkon. Li leviĝis kaj eniris la domon. La luno, brilanta tra la fenestro, videbligis al li lian patrinon, sidantan apud kameno. Li parolis al ŝi ameme, demande, sed ŝi nek respondis nek movis. Li pli apude paŝis, kaj estis metonta sian manon sur ŝian brakon, kiam lia fratino eniris la ĉambron, ekrigardis severe je lia vizago, preteriris lin, kaj eliris.

Li turnis sian kapon ŝin rigardi, sed kiam ŝi estis elirinta li returnis la okulojn al sia patrino. Ŝi ankaŭ estis forlasinta la ĉambron. Barr Lassiter alpaŝis al la pordo per kiu li estis enveninta. Li foriris la domon kaj revenis al la tendaro.

En la sekvanta tago, kun nenia decida intenco, li ree serĉis la lokon. Je kvarono de mejlo malproksime, li renkontis Albron, antaŭa kolego, kaj kunlernanton, kiu plaĉe salutis Barr.

"Mi iras viziti mian heimon," diris la soldato. La alia lin ekrigardis sagace, sed nenion diris.

"Mi scias," daŭrigis Lassiter, "ke mia familio ne estas ŝanĝinta, sed---"

"Estas okazinta multaj ŝanĝoj," interrompis Albro. "Ĉio ŝangiĝis. Mi iras kun vi, se vi ne kontraŭvolas."

Anstataŭ domo ili trovis fondaĵon de ŝtono, nigrigita per fajro, ĉirkaŭata per cindro kaj ruino. Surprizo de Lassiter estis treega.

"Mi ne sciis kiel rakonti al vi," diris Albro, "ke dum batalo antaŭ unu jaro via domo estis detruita per Federa bombo."

"Kaj miaj familianoj—kie ili estas?"
"En la ĉielo, mi esperas. Ili ĉiuj estis mortigitaj per la bombo."

-Tradukis Walter O. Anderson. -

IMITINDA PROPAGANDAJO.

Beleta fraŭlin', edzĉasanto, Eklernis la lingv' Esperanto, Ne jaro foriris, Ĝis oni jam diris: "Geedziĝo fariĝas ĝojkanto."

La afero espera beniĝis, Geedzujo fruktriĉe pleniĝis, Per kanto pli forte, Arie kaj vorte, Rondeto feliĉe grandiĝis.

Geidoj gepatrojn honoras, Reciproke la ĉiuj adoras; La temo de l'kanto: "Vivu Esperanto!" Per horo familia sonoras.

Gefraŭloj, konsile kaj ame,
Mi petas do faru vi same,
Ke niaj anaroj,
Per viaj bonfaroj,
Pligrandiĝos tutmonde kaj fame.
—J. E. Crary.

Gasto: Kelnero, mi estis mendinta buterpanon kun svisfromaĝo, sed jen mankas la fromaĝo!"

Kelnero: Ho ĉu estas neniu sur la telero? Jes fakte! Sed sciu, nia svisfromaĝo estas tiel grandtruhava, ke la kuiristino detranĉis eble truon kaj metis sur vian teleron.

Juna verkistino preterpasis kun adoranto de sia talento la domon, kie estis loĝinta fama verkisto.

Marmora tabulo allogis ŝian atenton. Ankaŭ sur la domo en kiu vi loĝas, kiam vi estos mortinta oni ankaŭ pendigos tabulon kun surskribo,—malgaje diris la adoranto.

Nu, kion vi diras! rediris tre flatita la sinjorino. Kion oni povos skribi sur ĝi? Kion? Oni skribos, ke la loĝejo estas

luebla.—El La Spritulo.

PAĜO MALSERIOZA

Cerpita el La Spritulo, jarabono Sm. 1.20, Kornerstrato 31, Leipzig, Germanujo.

Si estis malriĉa, maljuna virino, kiu aŭdis unuafoje la rakonton pri la krucmortigo. La pastro estis ĝojigita pri la impreso, kiun li estis farinta . . . ĝis la kara maljunulino, kun larmoj en la okuloj, ekkriis: "Esperu ni, ke ĝi ne estas vera."

Izako Bernŝtein, demandita pri mirinda diamanto, kiun li portas en la ĉemizo, ĝin

klarigis tiamaniere:

"Vi vidas, mi estis la sola plenuminto de la testamento de maljuna Moiso Mikelŝtein; kiam nome oni legis lian testamenton, ĝi diris, ke oni pagu du mil spesmilojn por ŝtono por lin memorigi.

Nu — jen tiu ĉi ŝtono."

Instruistino: Cu ci povas diri al mi, Elso, ion pri la epistoloj?

Elso: Eble, fraŭlino, ili estis la ed-

zinoj de la apostoloj.

Juna fraŭlino eniris preĝejon por ĝin vidi. Ĉar okazis speciala diservo, ŝi sidiĝis en loko antaŭa.

Kiam ŝi eliris la preĝejon, la pordisto postulis du spesmilojn. "Pro kio?" ŝi diris. "Pro la diservo postnaska!" li respondis.

"Postnaska diservo?" ŝi respondis mirigite, "sed mi ne estas edzinigita."

"En tiu okazo estas kvar spesmiloj!" li diris.

Oxford'a studento, nun eminenta klerikulo, havis maniegon petoli. Li estis, kaj estas, tre longa viro kun grava mieno. Iam li eniris poŝtoficejon kaj demandis al la oficisto, ĉu li tenas poŝtmarkojn.

La oficisto kun tolerema rideto respondis, ke li ilin havas, sed li estis iom surprizita per la proksima demando:

"Kiajn poŝtmarkojn vi havas?" "Ĉiujn valorojn kiuj estas eldonataj, sinjoro, de duonpencaj ĝis unufuntaj," li respondis.

Je kio la aĉetonto timeme esprimis volon vidi kelke da la pencaj markoj.

La oficisto metis sur la oficejtablon unu el la grandaj folioj, kiuj valoras dudek ŝilingojn. "Jen ili estas," li diris, "se vi deziras pencajn poŝtmarkojn, tiuj estas ili." La aĉetonto ŝajnis miregigita per la elmontro kaj ŝajnis, ke li ne povis sufiĉe rigardadi la markojn. Li rigardis kaj rigardadis, kaj fine post zorga ekzameno de la tuta folio, li almontris al unu en la mezo dirante: "Mi opinias, ke mi prenos tiun."

Kiel danĝera povas esti la ioma scio de

nia lingvo:

S-ino invitas amikinon je la naskofesto de unu el siaj infanoj kaj skribis jene: "Antaŭ ĉio, ne forgesu venenigi viajn du knabojn."

—"Jes, tre estimata fraŭlino, estas necese, ke mi faru malgrandan operacion sur via genuo."

-"Ho Dio," sinjoro doktoro, "ĉu oni ne vidos eble pli malfrue la cikatron?"

-"Tio dependos nur de vi, moŝta fraŭlino, ĉu ĝi estos videbla."

Gastiganto: (krias post foriranta regalita gasto): "Atendu, mi la ŝtuparon lumigos!"

Gasto (de malsupre): "Mi dankas ĝentile, mi kuŝas jam malsupre."

Kolportisto: (estante rekomendinta al sinjoro jam ĉion ajn eblan, montras al li boteleton da makulakvo): "Ĉu eble tio al vi estas plaĉa? per ĝi vi povas forigi ĉion!"

Sinjoro: "Donu malgrandan boteleton . . ., eble mi povos per ĝi forigi vin."

An American Edition

Do you know the "Whole of Esperanto?"

It's a neat little book containing the Anderson fable of the "Ugly Duckling," translated into Esperanto, with notes, and the Universala Vortaro of Esperanto. Thirty-six pages and a cover. We have been selling the little book at five cents, importing it from England. By permission of the publishers we are now manufacturing this book in Chicago, same as we have been for a year making the "Key." The reduced cost enables us to offer you the "Whole of Esperanto at 25 cents a dozen copies.



Whole ESPERAN

and the means of learning it without lessons. by reading a little story.

FOR FOUR CENTS

child learning its mother tongue is not troubled with grammar or lessons.

It finds out the meaning of a word and learns to use it as a verb, adjective, noun, pronoun etc., by hearing it spoken in different sentences and phrases.

Esperanto, may be taught and learnt in exactly the e manner.

same manner.
Lessons are not required.
This little booklet contains the whole of the Reperanto grammar and practically the whole of the words, only such having been omitted as are already well known to English-speaking people.

Re mere is required or necessary in order to become an expert Reperantiet, than the contents of this healtlet and—common-sense.

By carefully reading the first eight pages you will practically learn the whole of the grammar and structure of the language.

THE LECTURE TOUR.

So far the eastern lecture tour of Mr. Baker has met success beyond all ex-The first night, in a small pectations. country town with counter attractions and a hard rain, there was an audience of about a hundred persons, and though in a few places the gatherings were smaller than might have been expected, they were in many cases much larger. In more than one town part of the audience had to listen standing.

Almost without exception the newspapers have given much favorable publicity both before and after the lectures.

The tour is a complete refutation of the complaint that "the newspapers in our town won't say anything about Esperanto" and "our people are not interested." The newspapers will mention anything about it that is news, and the fact that in only one case out of forty has Mr. Baker's lecture been called off for lack of an audience (a rainy Sunday at that) proves that people are interested in the subject.

Time for April and May is practically all taken, but committees which would be willing to handle an "open date" may possibly secure such an engagement, as it is not always possible to make a route fill six nights a week.

Mr. Baker will be in and close to New York City the first week of May, will go southward on Atlantic coast the second week, spend the third week in the Carolinas, Georgia and Alabama, and close the tour with a homeward route through Tennessee, Kentucky, western Pennsylvania, Ohio and Michigan.

The exigencies of railway connections may make it possible to sprinkle in four or five more engagements. If you are interested, write Mr. Arthur Baker, General Delivery, New York City, and don't forget to name your closed dates for the week in your section.

CLASSIFIED ADVERTISING

Rate per line.... Prezo po linio...... Minimum charge......20 cents

FAKO DE KORESPONDADO

KIARIGO KAJ REGULOJ: La signo P montras, ke oni volas nur poŝtkartojn vidaĵajn; la signo L, nur leteroju. Sen signo, ŝŭ leterojn. Tiom da amerikanoj volas fremdajn korespendantojn, ke ni enpresas senpage adresojn de eksterlanduloj. Kiam presas senpage adresojn de eksterlanduloj. Kiam vi skribas u dek personojn, ne esperu pli ol dek kvin respondojn, car eĉ esperantistoj estas nur

UNITED STATES

UNITED STATES

Sro. Arthur Newcomb, Sargent, Nebraska.

F Fino. Ethel Steere, Asherville, Kansas
Edwin Larson, South Prairie, Pierce Co., Wash.

Sro. Odiorne Gleason, Route 17, Worcester, Mass.
Sro. H. N. Saxton, 68 South Allen Street, Albany, N. Y.
Sro. John C. Vasselin, Blossburg, Tioga Co., Penna.
Fino. Beulah Amidon, studento, 379 Seventh Avenue, South,
Fargo, North Dakota, deziras korespondi kun gestudentoj
en Cia parto de la mondo.

Sro. M. Stamenio, 28 Broadway, South Boston
F C. H. Gibbons, 407 Winona St., Austin, Minn.

Miss Emma J. Newell, 124 E. Main St., Westfield, N. Y.

O. R. Hamilton, R. F. D. 1, Franklin, Texas.

Prof. A. J. Charles, Westfield, N. Y.

FOREIGN-EKSTERLANDA

AUSTRIA

P Sro. K. Bohac, 5 Komensky Str., Bohemia Sro. Ernst Kaufmann, Ferdinandstrasse 53, Leitmeritz a-

Elbe, Bohemia Sro. Rudolf Sochor, Yakonbkovor ul. 3, Zizkov, Praha, P Sro.

Sto. Richard Blaha, studento, Hronov n. M., Bohemia Sro. Krenovsky Miloslav, Mistek, Moravia Sro. Voslow Krejsor, Hronov, n.M., Bunemia Sro. L. Syrinek, Silezio p. p. Dobra, Noŝovice

BELGIUM

Sro. C. Rogister, 102 Lambermont, Place de Liege, I gium, volis korespondi kun Socialistoj Sro. T. Verbrachen, 46 Longue rue Octeroom, Antwerp Place de Liege, Bel-

BULGARIA

Sro. T. H. Krestanof, Pleven Sto. K. Valev, Pleven
Fino. Zdr. Garibova, str. Car Boris, Pleven
Sro. Josef Leon, Pleven
Sro. D. Beraha, Pleven Sro. Marin Petkov, Kopriva, Pleven

Sro. L. H. Gorman, Box 624, Frince Rupert, B. C. ENGLAND

Sro. Arthur Lutcliff, 5 Oak Street, Padiham, Burnley

FRANCE
Fno. Crazelle Zoe, Rue d' Enfer, Romorantin
Sro. Hubert Georges, Grande rue, Romorantin
Sro. Moindrot Henti, Place d' Armes, Romorantin
Sro. Rucho Charles, Boulevard de la Gare, Romorantin
Sro. Harvier Fils, Rue Poste aux Dames, Romorantin
FP Fernando Laplana, Rue Corbeau 8, Paris—Xe
P Sino. Tromont, Villenauxe, (Aube)
P Sro. Peter Parret, 29 rue de Collège, St. Flour, (Cantel)

Oskar Bergmann, Kaiser Friedrich-Strasse 69, Char-

Sro. Oskar Bergmann, Naiser Friedrich-Strasse C., Chan lottenburg
Sro. Hanns Junge, Zeitzer Str. 1, Leipzig
Sro. Herman Rau, Rollner Str. 45, Nurnherg, Bayern
Fino. Gertrude Fuchs, Zollner Str. 20, Dresden
Sro. Hugo Hoehne, Zoelnerplatz 24 III, Chemnitz
Sro. G. Dehning, Kornerplatz 6, Leipzig, Germany, volas korespondi kun geesperantistoj en Chicago, Washington, D. C., New York kaj Providence.

H. LAND
L. Wynschenk, Jan Elar enstraat 70, The Hag C. Koekebacker, Fapanstraat 13, Delft.

HUNGARY

Sro. Nagy Jozef, studento de medicino, Budapest VI, liege-dius Laudor u. 17, III, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kaj poŝtmarkojn.

MEXICO

P Sro. Francisco de P. Llamas, Villarreal, 208, Zachica.

Mro. Wencelas Rodriguez, L. y Cos. 19, Vera Uruz, Mexico NORWAY

P Sro. N. H. Midthus, Lysekloster, Bergen

ROUMANIA.

P Sro. Levy Segall, 58 Sfintilor, Bucharest
Sro. Bernardo Herâkovič, strato Kazarmei No. 6, Bucharest

P Sro. A. Horbonos, Bolŝaja Lepatiha, Tavriĉeskoj gub.
Sro. Gregoir Ribin, Jarosslavl, Consistorium
Sro. V. K. Fomenko, poŝta kesto 1555, Odessa
J. Švarcherg, Rilisk, Kurskoj gub., Russia.
P St. Gluchowski, Kuganiec, Poland
P B. Gluchowski, Kuganiec, Poland
P B. Gluchowski, Klonowiec, p. Kutno, Poland
Sro. Aleksandro Vlasor, licejskoja 22, Kv. 5, Petersburg
P Sino. O. U. Semenova, Kluĉevaja 7, Vladivostok
P Fino. Edith Ellender, Lisden (de Barono London) per
Volmar, Livlando
Sino. A. Astafjev, Velak, gub. Vologda

SCOTLAND

Sro. Thomas Grieve, 16 Snowden Place, Stirling SERVIA

P Isailo Venadović, 9 Zeleni venac, Belgrade, Servia, in-tersanĝas kartojn nacikostumajn. Sinisa Budjevac, Brankova 19, Belgrade.

SPAIN

Srain Sro. Dua Gaucia, Strato Cortes 575, Barbelona Sro. Jose Buye, Calle Rosendo Nobas 13, Barcelona (Clot) Fino. Angelino Lenor, Calle de Guardia 14 bis. Barcelona, deziras korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo, por intersangi postkartojn (tipojnvidaĵojn, k. t. p.)

lona

P Sro. Toaquin Palazon, Momercio 29, Barcelona Sro. St. Bacardit, "Esjero Kataluna," Paradis 12, Bar-

REKLAMADO.

Fraŭlo deziras kamaradon por marŝi de Chicago al Wash-ington por la kongreso. Ekiros baldaŭ.—D. H. Grant, 609 East 44th Street, Chicago.

WILL SOMEBODY please send present address of Chas Kuharic, formerly of Denver, to W. G. Adams, Pilchuck, Thanks! Washington?

Mi faras ĉiuspecajn preŝaĵojn aŭ Esperantajn aŭ Anglajn, rapide, zorge kaj bonstile, je nealta prezo; donas antaŭ-kalkulon, kaj avizon senkoste.

ALADINO KAJ PALOMIDO:—Drameto konsistanta el la kvara akto de la Franca dramo "Alladine et Palomides," de la tre fama klasikulo Maurice Maeterlinck. Bonege tradukita el la originala Franca verko de la aŭtoro. Bele presita sur vergita papero kun beleta bonkvalita koverto. Prezo 25 cts. (1-2 spesmilo) poŝtpagite. ERNEST F. DOW, Esperanta presisto kaj eldonisto, West Newton Station, Boston, Mass., Usono.

NEW ARRANGEMENT OF THE OFFICIAL ESPERANTO SONG, LA ESPERO. Can be sung as a solo or quartet. Beautiful title page with map of the world, and star in green and white, the Esperanto colors. Arranged, published, and for sale by Prof. W. D. Andrew, 1328 East 47th St., Los Angeles, Cal. 18c a copy, postpaid; 12 copying \$1.75. 47th St., Los copies \$1.75.

Cu vi havas procesojn kontraŭ fervojaj kompanioj, aŭ pri ter-posedaĵoj. Mi povas fari al vi profitojn. Skribu al mi kaj ne permeau ke la leĝoj pri templimoj malhelpu vin.—D. B. Axtell, Advokato, Franklin, Texas, U. S. A.

Hair Goods, Toilet Requisites. Specialty, Wavy Switches.
-Prof. A. J. Charles, Westfield, N. Y.

HOW MANY OF JUNE?

ERE you ever in Portland, Maine? I am. Without all is dark and wet, and rain on a tin roof. Within, all is peace and lobster salad. It is 9:48, and this "copy" has to be in the mail at 10:00. No essays this time, Karuloj, but

GET THIS AND GET IT GOOD

Our June number will be devoted mostly to the Washington Congress—and if you want to help send a few thousand extra copies to foreign friends, the privilege will be yours—at five cents a copy, mailed in bundles TO YOU, and you send 'em where you please. The only way to be sure of getting them is to order in advance and send the price.

-Arthur Baker.

AMERIKA ESPERANTISTO

700 East Fortieth St.

Chicago, III.


The American Esperanto Book

The Book That Made This Magazine

For over three years The American Esperanto Book has exceeded the sales of all other Esperanto text books in America, and the profits have been devoted to Esperanto propaganda and the support of this magazine. The only book written especially for Americans, with a strictly American circulation.

Pronunciation: Clearly explained, with keys and exercises. No teacher needed.

Grammar: The original international rules, with translation; a careful analysis from the viewpoint of the person of moderate education.



Exeroless: Forty-two standard international exercises, by Dr. Zamenhof, author of Esperanto. Each has vocabulary notes and translation.

Vocabularies: Esperanto-English, complete, 76 pages; English-Esperanto, selected, 54 pages.

PRICES, COMBINATIONS AND CLUB RATES

\$1.50	Standard Edition, cloth bound, postpaid for \$1.00. In clubs of five or more, .75 With year's subscription to Amerika Esperantisto The Combination in clubs or five or more, \$1.20.
1.75	American Esperanto Book in Flexible Leather, \$1.25. In clubs of five or more, \$1.00 With year's subscription to Amerika Esperantisto
1.00	The same book (same plates and pages) printed on thin bible paper, with paper cover, is never sold, but is given free with a year's subscription to Amerika Esperantisto at
.60	This paper-covered edition is excellent for class work where cheapness and completeness are both desired. It has the necessary vocabularies, and with the magazine, there is much available reading matter. Given with a six months' subscription at In clubs of five or more, .45

To Esperanto Clubs, and to responsible persons wishing to form clubs, we supply quantities of The American Esperanto Book, with magazine Subscription Cards, on account, to be paid for as sold. Nine-tenths of the Esperanto clubs in America use this book, and find it convenient to keep a supply on hand without investment. Unsold copies are always returnable.

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY

700 East Fortieth Street,

CHICAGO